

# Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE  
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

Հայաստանի  
Գրական Կենտրոնի  
Գրական Կենտրոնի



Pokrovitelj:  
PRIMORSKO-GORANSKA  
ŽUPANIJA  
Supokrovitelj:  
GRAD RIJEKA  
Sponzori:  
"NIVIERA DEKOR" Matulji,  
"JADRAN HOTELI" d.d. Rijeka,  
"ZANATSERVIS" d.o.o. Opatija,  
"PROMET MILENIJUM" d.o.o. Rijeka,  
"DINA PETROKEMIJA" d.d. Omišalj  
Medijski pokrovitelji:  
NOVI LIST  
HRVATSKI RADIO - RADIO RIJEKA



Ĉi-numere legu pri:  
**100 JAROJ DE ESPERANTO EN RIJEKA**  
**50 JAROJ DE SEK ZAGREBO**  
**FONDO DE UNUIĜO DE ZAGREBAJ  
ESPERANTISTOJ**  
**AKTIVECOJ DE NEVIDANTAJ  
ESPERANTISTOJ EN KROATIO**  
**LA VOJAĜO DE LA RUĜA BIKIKLO**

Virina koruso de Kultur-arta societo "Uĉka"  
el Matulji dum solenaĵo en Rijeka

Josip Pleadin

1

2008

<http://zagreba-esperantisto.blogger.hr/>

## Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj  
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

## Ĉefa redaktoro:

Josip Pleadin  
B. Jelčića 138 A  
HR-48350 Durdevac  
Kroatio  
josip.pleadin@gmail.com

## Respondeca redaktoro:

Radenko Milošević  
Goljak 43  
HR-10000 Zagreb  
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

## Redaktejo kaj ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96  
HR-48350 Durdevac  
Kroatio  
grafokom@kc.htnet.hr  
zagreba.esperantisto@gmail.com

## Redakcianoj:

Marica Brletić, Snježana  
Habulin, Vida Jerman, Jozo  
Marević, Radenko Milošević,  
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

## Presis:

Grafokom, Durdevac

## Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro, marto, majo, julio, septembro kaj novembro). En 2008 aperos ses numeroj.

## Jarabono por 2008:

**en Kroatio:** 75,00 kunaĝoj  
al ĝirkonto de "Grafokom"  
2360000-1100925404

**alilande:** 15,00 eŭroj  
al UEA-konto: plea-k

## Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg  
176, NL-3015 BJ Rotterdam  
libroservo@co.uea.org

Orbis Pictus, Via Parini 5  
IT-34129 Trieste  
orbispictus@iol.it

## RESUMO

La ĉefaj jarfinaj eventoj en kroatia Esperantujo certe rilatas al du jubileoj: la 100-jara en Rijeka, festita solene la 17-an de novembro, kaj la 50-a de Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo, aranĝita en Eŭropa Domo en Zagrebo, la 10-an de decembro. Du tagojn poste, Zagrebo fariĝis pli riĉa je nova Esperanto-organizaĵo: Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE), kiu estas (re)fondita kiel planite, la 12-an de decembro. Aldonendas informo pri la kurso pri eko- kaj interlingvistiko ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo, kiu traktos ankaŭ Esperanton. Per aktivecoj de nevidantaj esperantistoj komenciĝis la jaro 2008: ili ĵus eldonis brajle la vortaron "10.000 vortoj", kiu estis oficiale prezentita la 4-an de januaro. Pri la laboro de najbarŝtataj esperantistoj en Banja Luka legu la raporton el la unua mano de kroataj partoprenintoj, kaj pri la fora Afriko, el la unua mano de tieaj aktivuloj.

Post la lanĉita informo pri aŭspicio de la Centjariĝo, kiun akceptis la ŝtatprezidento Stjepan Mesić, el lia Oficejo venis ankaŭ skriba konfirmo de tiu informo.

Jarfine ni eksciis pri la finita verkado de grandaj vortaroj Esperanta-kroata kaj Kroata-Esperanta de Lucija Borčić. Ni aldonas bonintencan komenton.

Aparte interesa legaĵo estas vojaĝpriskribo el la aventura 25.000-kilometra bicikla vojaĝo de svisa esperantisto de Baselo ĝis Aŭstralio, kiu sukcese finiĝis en oktobro.

Kun bedaŭro ni notas ankaŭ du mortojn, inter ili ankaŭ de la plej aĝa kroatia esperantisto.

Ni rememoras ankaŭ pri historiaj temoj. Pasis jam dekkvin jaroj de post la eksilento de Esperantaj elsendoj de Radio Zagrebo (Kroata Radio). Pri tiu temo verkas la atestanto kaj kunkreinto de la elsendoj Vlado Jurković.

El la mondo abundas informoj. Kiel kutime ni traktas la ĉefajn temojn kiuj skuis, amuzis aŭ informis la mondan Esperanto-movadon. Ni invitas vin partopreni renkontiĝojn, kongresojn kaj konkursojn, kaj legi iom da prozo kaj poezio.

Kun danko ni notas aparte bonan reeĥon pri nia invito helpi la "Abonhelpan Fonduson". La kolektita sumo ebligas al pli ol 25 nepagipovaj legantoj ricevadi nian revuon dum 2008. Aparte ni dankas al Sava Matetić-Lučić, kiu per personaj pagoj mendis jarabonojn por pluraj geamikoj.

La jarkomenca numero ŝajnas iomete pli movadeca ol kutime, sed ni esperas, ke vi ĝuos ĝin. Ĝi estas presita sur malpli dika papero, sed ni supozis, ke vi preferas ricevi kvar aldonajn paĝojn senpage, ol la dikpaperan numeron. Ĉu ni pravis?

La redaktoro




## Evento en Zagreba Ekonomia Ĉambro

En Zagreba Ekonomia Ĉambro la 12-an de decembro 2007 okazis kunsido de la Ekonomia Konsilantaro de la Ĉambro pri la temo: "Ekonomio de la urbo Zagrebo kaj Zagreba departemento". La enkondukan prelegon preparis Ekonomia instituta de Zagrebo, nome ĝia direktorino.

La kunsidon ĉeestis multaj elstaraj politikistoj kaj ekonomiaj fakuloj, inter kiuj ŝtata prezidento s-ro Stjepan Mesić, urbestro de Zagrebo s-ro Milan Bandić, departementestro s-ro Stjepa Kožić, kaj prezidento de Zagreba Ekonomia Ĉambro s-ro Zlatan Fröhlich. Post la ĵurnalistaj demandoj, sekvis neformala babilado, kiu por esperantistoj povas esti tre interesa.

En konvena momento aliris la prezidenton Mesić kaj la urbestron Bandić la redaktoro de "Zagreba Esperantisto", respektive vicprezidento de KEL s-ro Radenko Milošević, montrinte al la prezidento frontpaĝon de la revunumero kun lia bildo (vidu la foton!). Parolinte denove al la prezidento pri ĝeneralaj problemoj de kroataj esperantistoj, la ĉefredaktoro demandis la prezidenton: "Ĉu vi povas helpi al ni esperantistoj kontaktigi nin kun la urbestro de Zagrebo?" Al la konversacio aliĝis prezidento de la Ekonomia Ĉambro, dirinta: "Jes, s-ro prezidento, ankaŭ ni el la Ĉambro subtenas esperantistojn!", je kio diris la urbestro: "Ja vi ne bezonas helpon de la prezidento por veni al mi." La redaktoro respondis: "Mi ja scias, ke vi diris, ke via pordo estas por mi ĉiam malfermita!". La prezidento diris ŝerce: "Ho ve, sed li eble neniam estas post tiu pordo!". Jesinte la ŝercon, la redaktoro ricevis de la urbestro inviton: "Venu *'legendo'* ke ni interkonsentu pri ĉiuj detaloj!" Akceptinte la inviton, la redaktoro aldonis: "Rememoru, ke mi jam diris al vi: mi venos kun sandviĉo, termobotelo kaj tripeda seĝo por atendi vin antaŭ via pordo!". Ĉu nur ŝerco?

*Intertempe el la Oficejo de la Prezidento venis ankaŭ oficiala dokumento pri aŭspicio de la Centjara jubileo de Esperanto en Kroatio.*



# EL (APUD)BALKANAJ INTERKRUTEJOJ (Alivorte: kiel forbalai sub tapiŝon)

 Radenko Milošević

Oni kutimas komenci tekstojn per citaĵo aŭ enkonduka vorto. Estu ankaŭ ĉi-foje tiel! Erasmo de Roterdamo skribis siatempe en la verko "Querella pacis" (Kverelo de paco): "Militoj kreskas unu el alia, el unu milito kreskas du militoj". Ne temas nur pri armilaj konfliktoj en Eŭropo, sed nuntempe ĉiam pli ofte, aparte dum "balota periodo" en unuopaj landoj, pri buŝa kaj skriba konfliktado, disputado kaj atakado inter ŝtatoj, pro enlandaj balotkampanjoj.

En okcidenta parto de Eŭropo dum jardekoj kaj jarcentoj ĉiam oni traktis la sudorienton de la eŭropa kontinento, respektive Balkanan duoninsulon, kiel tumultan, nuboplenan kaj neklaritan parton de Eŭropo. En la pasinta jarcento okazis t.n. Balkanaj militoj: la unua kontraŭ Turka Imperio, kaj la dua pro la kverelo inter la triumfintaj landoj. Rapidege sekvis ilin la Unua mondmilito, kiu finiĝis per sudslavaj streboj al komuna ŝtato, fiaskinta en la Dua mondmilito. Sekvis la dua (socialisma) komuna provo, forbrulinta en la sensenca kaj brutita intermurdado kaj finiĝinta per aro da novproklamitaj ŝtatoj. Kaj la procedo ankoraŭ ne venis al la fino.

Kie en tiuj eventoj estis Eŭropa Unio kaj Usono? Ŝajne, tra propraj kalkuloj ili rigardis la buĉadon de senarmilaj homoj en la trudita milito. Kian scenaron en politika senco preparis por ordinara homo la mondaj politikaj ŝtataj kaj pseŭdoŝtataj moŝtoj? Ĉu oni ne antaŭflaras negockuirejon? Oni povus paraleli kun la verdikto de Salomono, kiu devas juĝi pri unu filo kun du mem-proklamitaj patrinoj? En eksa bulteno "ZELano", oni skribis pri tio, petante ankaŭ helpojn de esperantistoj! Sed ili restis surdaj.

Prepariĝante por tiu ĉi teksto, mi trafolumis la tekstojn de neanstataŭebla d-ro Ivo Lapenna. Por mi li estis la mejloŝtono de neŭtralismo en Esperanto-agado. Jen kion li opiniis antaŭ jardekoj: "Ĉu kaj kiel ni esperantistoj devus esti – neŭtralaj?". Lapenna ĉiam kaj ĉie levis la voĉon kontraŭ ĉiuj diktatorecaj kaj totalecaj eventoj kaj personoj. Li skribis: "... La hodiaŭa individuo ne estas, ne povas esti neŭtrala. Ellerninte Esperanton oni ne povas iĝi ...neŭtralaj rilate al okazantaĵoj en la mondo..." (en "La suda stelo" n-ro 2/1937 en la artikolo "Malneŭtrala neŭtraleco"). Kaj ankoraŭ: "...Internacia Lingvo (ne) neŭtraligas la homojn." Per tio mi kuraĝiĝis.

Al la temo! La aktuala situacio ĝenerale en Eŭropo, (kaj aparte en balkanaj interkrutejoj) plenas je nekredelblaj kaj nesolvitaj aŭ duonsolvitaj problemoj. Torĉaj fajreroj ie jam flagras! La mondaj potencoj Usono, Rusio kaj Eŭropa Unio flustras post fermitaj pordegoj.

Dum jaroj flagras kaj estas antaŭ eksplodo la situacio pri Kosovo, la nuna parto de Serbio, kiu per

albana plimuto strebas al sendependa ŝtato. Serbio kuraĝigita flanke de Rusio, kaj Kosovo kun albanoj aliflanke konsultiĝinte kun Usono kaj ĉefludantoj el Eŭropa Unio, ludas danĝeran rolon en la procedo de unuflanka sendependiĝo kontraŭa al la opinio de la ŝtataj aŭtoritatoj de Serbio. En la monda politika pota oni nomas tion "glaciigita konflikto". Popaŝa aplikado de "Plano de Ahtisari" ne malkovras la nubkovritajn atingojn kaj celon.

Kaj kion ĝi povus kaŭzi en Eŭropo?

Disdividoj komenciĝis en orienta parto de Eŭropo per dividiĝo de Ĉeĥio kaj Slovakio. Nuntempe Belgio jam skuĝas en dividoj al du partoj: flandra kaj valona. Ne timas la saman proceson Granda Britio kaj Reĝlando Hispanio! Kiom da tempo ni revenu tra la eŭropa historio? Dividoj kaj separado, procedoj kontraŭaj al la ideoj de Eŭropa Unio, jam aperas en norda parto de Italio.

Ni rememoru la destinon de la insulo

Korsiko, por ĝia strategia situo en Mediterana maro. Multjara estis la armila lukto inter Italio kaj Francio, kaj siatempe eĉ la ŝtato-urbo Ĝenovo dominis super Korsiko ĝis 1768. Pasquale Paoli (1725-1807) batalis longe por la korsika sendependeco neniam akirita. Suda Tirolo, post la malapero de Aŭstri-Hungara Imperio, post la Unua mondmilito, pro la konataj kialoj fariĝis parto de Italio, simile kiel parto de la kroatia teritorio.

Kia dispecigo sekvas ene de Eŭropo? Kien forruliĝos tiu neĝbulo!? La eŭropaj ŝtatoj kaj popoloj devas finfine enfosi milithakilojn ene de senbaraj landlimoj.

Kroatio, dum eksa Jugoslavio havinta bonajn rilatojn kun Respubliko Slovenio, nuntempe konstante havas problemojn kaj provokojn el flanko de sloveniaj politikistoj kaj politikantoj. Eble menciindas la ridinda diro de unu el la kandidatoj por prezidento de Slovenio, ke "Kroatoj estas brutoj". Jes, sed...

Lastatempe en kroataj gazetoj oni konstante legas pri t.n. "Protektita ekologia-fiŝkaptata zono".

Temas pri ia vortkombino el la jaro 2000, kiu egalas al "Ekskluziva ekonomia zono" el la Konvencio de Unuiĝintaj Nacioj pri Mara Juro. Pri kio do temas? Temas pri internaciaj akvoj kiuj etendiĝas inter la kroataj plej foraj insuloj kaj la itala lando. En tiu zono la sola fiŝkaptata rajto devus aparteni al kroataj fiŝistoj, samkiel al Kroatio apartenas devo protekti kaj renovigi la fiŝkvanton, kaj obei la periodon de fiŝad-malpermeso. Tian "ekonomian zonon" deklaris jam 136 ŝtatoj kaj nur dek kiuj havas la saman rajton, ne faris tion ankoraŭ. La problemoj kiuj originas el Italio kaj Slovenio kiel partoj de Eŭropa Unio, tiklas kaj zorgigas la kroatian flankon pro ebla prokrasto de aliĝo al la sama Unio. Samtempe Italio proklamis la zonon en 2006 kaj Slovenio senrajte ekspluatas la maron



pri kiu Kroatio havas ekskluzivan suverenan rajton. La kroataj fiŝistoj perdas jare pro la italia uzurpo de la kroata maro inter 250 kaj 300 milionoj da eŭroj. Krom tio menciendas, ke la itala fiŝista ŝiparo estas pli forta, moderna kaj pli multnombro ol la kroata. Simile al Slovenio kondutas neniu eŭropa ŝtato, sed Bruselo ne riproĉas ĝin. Samtempe Groenlando, aŭtonoma regiono de Danlando ekster Eŭropa Unio, subskribis kontrakton kun la Unio pri fiŝkaptado kaj pri eŭroperlaboro dum certaj jaroj.

Ni ne tuŝu la kalkulado de Eŭropa Unio pri aliĝo de unuopaj landoj kiuj estas pli mafortaj ekonomie kaj demokratie ol Kroatio! Nehavante konstitucion Eŭropa Unio estas ia superŝtato, sed ĝi ŝajne ne respondecas pri agoj de unuopaj ŝtatoj-membroj. Slovenio tenas okupitan la monton Sveta Gera, parton de Kroatio. La okupacio okazis dum Kroatio batalis en la Hejmdefenda milito. La sloveniaj slodatoj invadis la ĉepintan soldatejon. Pri golfo de Savudrija - ni eĉ ne uzu vortojn.

Eŭropa Unio surdmutas! Pasintjare, la 11-an de decembro, Itala Poŝto lanĉis poŝtmarkon kun bildo de urbo Rijeka kaj la akompana teksto: "Fiume - terra orientale gia italiana" (Rijeka - orienta lando estinta itala". Kroatia registaro protestis kontraŭ tio "akre kaj kun profunda malkontento". La poŝtmarkon desegnis iu s-ro Missoni, proklamita "prezidanto de la departemento de Zadar - en ekzilo".

Tiam oni povis legi la komparon, laŭ kiu tia proklamo egalas al proklamo de "prezidanto de departemento de Boka Kotorska" aŭ "de registaro de Zemun" (ambaŭ teritorioj kun kroata loĝantaro, sed nuntempe apartenantaj respektive al Montenegro kaj Serbio).

Eŭropa Unio surdmutas! Imagu, kia bruego okazus, se Germanio eldonus poŝtmarkon pri "Koridoro de Dancigo", aŭ nuntempa Kaliningrado en Rusio!

Nu, tio ĉio estontece estos apenaŭ piednoto en la historio...

Ni invitas vin: komentu la tekston kaj sendu viajn opiniojn al la retpaĝo de "Zagreba esperantisto": [www.zagreba-esperantisto.blog.hr](http://www.zagreba-esperantisto.blog.hr).

## Ĉu pluvas, ĉu ventas - ŝi ĉiam bonsentas

*Etel Zavadlav*

Ĉar ŝi spektas malmulte da TV programoj,  
ĉar ŝi ne glutas tro da reklamoj -  
tial prestiĝo ŝin ne ĝenas,  
en kapon ŝian aero venas -  
ŝian cerbon profunde aerumas  
tial facile ŝi cerbumas.

Pri Sanktarbaro\* ŝi ne revas,  
ŝminki okulojn - tute ne devas,  
kaj ne bezonas Vuiton sakon  
por pendigi ĝin al sia brako.

Ŝi ne sopiras Blahnik ŝuojn -  
piedo eniras pli simplajn truojn.

En mondo ŝia *raza tabulo* -  
al ŝi ne mankas razita saĝulo -  
ĉar ŝi preferas ja barbulon

kiu odoras je akvomelono,  
kiu engrimpas tra ŝia balkono,  
nur por saluti ŝin dece -  
(li agas tre homece)

kaj tute ŝin ne tuŝas  
dum ŝi trankvile kuŝas -  
tiel nenion fuŝas.

Kies mondo ne estas reala -  
ŝia simplega,  
infaneca,  
aŭ via lukta, batala,  
tre ofte maldeca,  
ĝisoste klopodanta,  
per senco mankanta,  
(kaj ankaŭ esenco, kompreneble),  
kara amiko - jen la demando -  
sur kies ŝultron iros rubando?


Ĉu pluvas, ĉu ventas - ŝi ĉiam bonsentas -  
kaj tio estas sufiĉa.

\*Sanktarbaro - Hollywood

### BLOGO DE TILIO

La ĉi-supra poemo estas ĉerpita el la blogo <http://www.ipernity.com/blog/e.tilio> kie troviĝas ankaŭ aliaj samaŭtoraj literaturaĵoj.

## Jubileo en Rijeka




*Nova kroatia ZEO: Memortabulo pri Adriatika Ligo Esperantista (maldekstre) kaj la tri vicprezidantoj de Kroata Esperanto-Ligo pozantaj antaŭ ĝi.*



*La jubilea bankedo (supre), festa torto kun la societa blazono (malsupre) kaj stampado de unuataga koverto (malsupre dekstre).*



# 100 Jaroj

 Josip Pleadin



Zagreba Esperantisto



## Intervjuo: Boris Di Costanzo

✍ Emil Hrvatin

**Post 120 jaroj da ĝia ekzisto en multaj landoj, kaj Esperanto-movado havas 100-jaran tradicion. Sed Rijeka estas modela ekzemplo kiel profiti la jubileon. Jen kion pri la jubileo kaj ĝiaj preparoj diras sinjoro Boris Di Costanzo, prezidanto de Esperanto-Societo Rijeka, la ĉefa protagonisto de ĝiaj preparoj.**

-La ideo naskiĝis antaŭ 4 jaroj, kiam sinjoro Morankić kaj mi kunveturis al Bruselo. Dum la vojaĝo sufiĉis tempo por interparoli. Ni konkludis, ke ni povos solene festi 100-jariĝon de Esperanto en Rijeka. Ni ankaŭ supozis, ke la Urbo Rijeka kaj Departemento Primorsko-Goranska subtenos nin. La programon ni longe planis. La preparoj daŭris la tutan pasintan jaron. Ekzemple, la traktado pri starigo de la memortabulo daŭris 3 monatojn. Ni bezonis konsenton de urbaj institucioj kaj de la loĝantoj de la domo mem. La Konservada instituto de Rijeka decidis pri aspekto de la memortabulo. Ni bezonis permesilon por loki ĝin. Jen kuriozaĵo: Ni malkovris la memortabulon je la 11h00. Sed instalita ĝi estas je la 10h00. Dum ni atendis komencon de la solenaĵo, oni informis min, ke la laboro estas finita. Nu, ni ne panikis ĉar ĉio estas detale interkonsentita. La ejon por solena programo ni devis rezervi jaron antaŭe. Ankaŭ pro banderolo en Korzo ni devis vizitadi urbajn instituciojn. Ĝin financis nia sponsoro, al kiu ni dankas.

**Dank' al la solenaĵo, Esperanto en Rijeka ricevis novan monumenton kaj longdaŭran reklamon por venontaj tempoj.**

daŭrigo ➔ paĝo 6

## Impresoj

La festo de centjariĝo post fondiĝo de la unua Esperanta organizaĵo en Kroatio, dank al grandaj klopodoj de Esperanto-societo Rijeka kaj realigintoj de la interesa kaj riĉa programo plene sukcesis. Bonaj spertoj kaj rekomendoj por sekvontjara centjariĝo en Zagrebo. Precipe gravas studi kaj esplori la historion kaj bone pritaksi personojn kaj eventojn en koncerna periodo. Rijekanoj kun sia kontribuo estas bona ekzemplo.

**Zlatko Hinšt (Zagrebo, Kroatio)**



Mi estas tre kontenta ĉar mi partoprenis la 100-jariĝon de Esperanto-societo en Rijeka. Tiam mi renkontis malnovajn Esperanto-amikojn kaj ekkonis novajn. Kiel prezidanto de Esperanto-societo "La mondo" el Banja Luka, mi proponis subskribi protokolon inter la du societoj, kio baldaŭ realiĝos. La organizantoj tre bone preparis la jubileon kaj mi "ŝtelis" kelkajn ideojn por niaj estontaj programoj. Mi esperas kaj sincere deziras, ke la kunlaboro de esperantistoj el Banja Luka kun samideanoj el Kroatio estonte estos pli bona ol en la pasintaj jaroj.

**Miĉo Vrhovac (Banja Luka, Bosnio kaj Hercegovino)**



Kun vera plezuro mi ĉiam revenas al Kroatio, ĉar tie centjara datreveno ne estas nur pensado pri historiaj eventoj sed ankaŭ kontinuo de tiama flugo de facila vento. Same estis fine de 2007 en Rijeka. Mi ĝuis bonan organizadon, la verdan etoson kaj renkontigon kun pluraj amikoj. Tial... Mi volas danki vin, sinjoro Ludoviko: **Pro la batal' por fino venka De Adriatika Societ' Nuna laboro de Spomenka Belec', talento kaj kviet' Georgo Handzlik (Pollando)**



Laŭ mi, la Jubileo plene sukcesis, ĉar la prezidanto Boris Di Costanzo kaj la vicprezidanto Vjekoslav Morankić kune kun aliaj gesamideanoj, multe kontribuis per grandega laboro. Krome, ĉe kulturdomo, Georgo Handzlik, Neven Mrzlečki kaj la kapablega aktorino-kantistino Vida Jerman permesis al la partoprenantoj trovi agrablan etoson, taŭgan en similaj cirkonstancoj. Kiel asocio de Triesta Esperanto-Asocio, kion minimume mi povis fari por memorigi la Jubileo en Rijeka? Simple, pretigi kupran memorajon, sen forgesi la jusan Esperanto-gemeliĝon inter Triesto kaj Rijeka.

**Elio Nocent (Triesto, Italio)**



## → daŭrigo el la paĝo 5

### Antaŭvidita estis ankaŭ prezento de Esperanto-strato?

Strato de Rijekaj Esperantistoj estas antaŭvidita apud kampuso de la Universitato de Rijeka en urboparto Trsat. Ĉar la kampuso estas ankoraŭ konstruata, la strato ankoraŭ ne estas montrinda. Pro tio la magistrato de Rijeka prokrastis nomumon de la strato, sed ni havas firman promeson, ke ni havos "nian" straton.

### La jubilea laboro estis granda, supozeble ankaŭ la elspezoj?

Jes, la elspezoj estis ne malgrandaj. Sed, dank' al subvencioj kaj donacoj de pluraj entreprenoj, de la urbo kaj departemento, ni sukcesis ĉion organizi per sumo de 60.000 kunaĵoj.

### Kiel reagis la rijeka publiko?

Du homoj aliĝis al nia societo. Rijekanoj havis eblecon multe ekscii pri nia agado pere de televido, radio kaj gazetoj. Homoj vizitadis ekspozicion de nia literaturo, multaj miris kiom da libroj en Esperanto ekzistas. Precipe kiam ni eksplicis al ili, ke la ekspoziciitaj libroj estas nur grajnoj en kampo de Esperanta literaturo. Vizitadis ĝin eminentaj lingvistoj ofertante kunlaboron, sed ankaŭ iamaj esperantistoj. Pli ol cent homoj enskribis siajn impresojn en libron de vizitantoj.

Ni realigis la ekspozicion kunlabore kun Urba Biblioteko de Rijeka kiu estis aŭspicianto. Dankon al sinjorino Marija Šegota Novak, direktorino da la biblioteko, kiu multe helpis al ni. Dankon ankaŭ al deĵorantoj el nia societo. Ne facilis deĵori de la 8h00 ĝis la 20h00 ĉiutage de la 12-a ĝis la 30-a de novembro.

Entute, mi povas diri ke nia laboro sukcesis.



Kupra memoraĵo donacita al la organizanto de Elio Nocent el Triesto.

## TAGOJ POR LONGA MEMORO

✍ Emil Hrvatin

La 12-an de novembro du artistoj kun gurdo, paro en antikvaj kostumoj, gvidis grupon kun granda Esperanto-banderolo. Ili haltis ĉe la monumento al militfalintoj por sendependa Kroatio, omaĝante ilin per unuminuta silento. Transirinte Ponton de Kroataj Defendantoj la grupo denove haltis ĉe la fontanon donacita de Kawasaki, la japana urbo kun kiu Rijeka ĝemeliĝis antaŭ 30 jaroj. La grupon ĉe la fontano konsistigis, krom la kroataj esperantistoj, ankaŭ niaj gastoj el Bosnio kaj Hercegovino, Italio, Serbio, Slovenio kaj Svislando. El preskaŭ ĉiuj Esperantaj societoj el Kroatio venis gastoj per speciala buso el Zagrebo kiu pasis tra Gorski Kotar malgraŭ dika tavolo da neĝo.

La gurdo-muziko plue gvidis la grupon tra Korzo, la ĉefa promenejo en la urbocentro de Rijeka. Banderolo super la promenejo atentigadis la rijekanojn, ke en la urbo estas festata Jubileo de Esperanto. Je la 11h00 la grupo alproksimiĝis al Esperanta flago pendanta sur muro de la domo en Korzo n-ro 18. En tiu domo troviĝis sidejo de Adriatika Ligo Esperantista (ALE), la unua Esperanta organizo en Rijeka kaj Kroatio, fondita la 28-an de septembro 1907. Boris Di Costanzo, la aktuala prezidanto de la Societo, tralegis 37 nomojn de la unuaj membroj de ALE kaj poste malkovris la memortabulon.

Post malkovro de la memortabulo, ĉiuj gastoj direktiĝis al Popola Legejo, kie la Urba librejo Rijeka kaj Esperanto-Societo Rijeka malfermis ekspozicion de Esperanta literaturo kun 86 libroj en Esperanto. Samloke estis prezentita filatela koverto kun unuataga stampo. La koverton ornamas nomlisto de la unuaj membroj de ALE. Cent kovertoj eldoniĝis kun kroata poŝtmarkon kun Zamenhof-portreto. La koverton prezentis prezidanto de Filatelista Societo Rijeka, sinjoro Borja-Borut Kopani.

La 13-an de novembro prelegis Spomenka Štimec el Zagrebo pri "Kroata literaturo tradukita per Esperanto al aliaj lingvoj kaj Originala literaturo en Esperanto en Kroatio". La 23-an de novembro tie prelegis ankaŭ Vjekoslav Morankić pri "Esperanto-Movado en Rijeka kaj ĝia regiono ekde la komenco ĝis nun".

Post vizito al la sidejo de Esperanto-Societo Rijeka sekvis urborigardado gvidata de Vjekoslav Morankić, tagmanĝo kaj vizito al la fortikaĵo de Trsat.

La festa programo komenciĝis en Kroata Kulturdomo en Sušak je la 18h00 per kroata himno. La programon gvidis Vida Jerman, kroata artistino kaj esperantistino.

Per sia partopreno honorigis la feston la urbestro de Rijeka, sinjoro Vojko Obersnel, kiu per inspira kaj favora salutparolo (parte en Esperanto) pligrandigis la solenaĵon. La blazono de Rijeka, donacita de la urbestro, restos por ni estimsigno de la magistrato.

Gratulojn sendis reprezentantino de Eŭropunia parlamento sinjorino Margareta Handzlik el Pollando, prezidanto de UEA Probal Dašgupta, UEA-estrarano pri kulturo Claude Nourmont, prezidantino de Dana Esperanto-Asocio Ileana Schröder, kiu lernis Esperanton en Rijeka, kaj sekretario de Esperanto-Asocio Milano Ermigi Rodari. Je nomo de KEL salutis vicprezidanto Radenko Milošević. Je nomo de Triesta Esperanto-Asocio gratulojn kaj donacojn transdonis sinjorino Elda Doerfler sekretariino de TEA kaj Elio Nocent. Sinjoro Mičo Vrhovac donacis kaj gratulis je nomo de esperantistoj el Banja Luka, Bosnio kaj Hercegovino. Gratulmesaĝojn sendis Inge Simon el germana urbo Aalen, Danuta Kowalska kaj Krystina Stendera el Pollando,





Kitagawa Hisasi, prezidanto de Esperanto-Societo de Kawasaki kaj Hori Jasuo, estrarano de UEA pri landa kaj regiona agadoj. Surloke gratulis reprezentantoj de preskaŭ ĉiuj Esperantaj organizadoj el Kroatio.

La Societa prezidanto Boris Di Costanzo legis referaĵon pri 100 jaroj de Esperanto en Rijeka kaj Kroatio.

Vida German recitis, aktorin kaj kantistin. Per sia gvidado de la programo kaj per sia programo ŝi gajnis simpatian de la spektantaro kaj elvokis longdaŭran aplaŭdon.

La Virina koruso "Uĉka" el Matulji krom sia kutima repertuaro kantis ĉe la malfermo la kroatan himnon kaj ĉe la fino "La Espero"-n.

Neven Mrzlečki per sia natura kantado kaj brila voĉo kortuŝis la spektantaron. Georgo Handzlik kantis jam klasikajn erojn "Mi volas danki vin, sinjoro

Ludoviko", kaj kelkajn pli novajn kanzonojn kun granda sukceso.

La programo daŭris pli ol unu horon je ĝojo de la spektantaro, kies nombro superis nian atendon: ĉirkaŭ 150 vizitantoj alvenis al Kroata Kulturdomo.

Ĉe la fino, dankinte al la aŭspiciantoj (Departemento Primorsko-goranska kaj Ūrbo Rijeka) kaj subtenantoj ("Novi List" kaj "Kroata Radio - Radio Rijeka") prezidanto de Esperanto-Societo Rijeka invitis ĉiujn partopreni la koktelon, dum kiu estis tranĉita speciala jubilea kuko. Ĉiuj gastoj ricevis saketojn kie, interalie, troviĝis luksa turisma prospekto de Rijeka en Esperanto, kiun eldonis Turisma Asocio de la Ūrbo Rijeka, kaj ceramika kruĉo kun surskribo "Tostu kun ni". Pri la jubileo informis lokaj radio, televido kaj gazetoj. Kontentaj gastoj disiĝis en gaja etoso je la 21h00.

## Kurso pri ekolingvistiko kaj interlingvistiko ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo

*Velimir Piškorec*

Fako pri germana lingvo kaj literaturo ĉe Filozofia fakultato en Zagrebo ofertas dum la akademika jaro 2007/2008, kadre de siaj kursoj pri lingvistiko, ankaŭ kurson pri ekolingvistiko kaj interlingvistiko. La kurson gvidatan de *Velimir Piškorec* partoprenas dudeko da studentoj kaj scienca novicino Aleksandra Ŝukanec. Dum la vintra semestro ili okupiĝas pri ekolingvistiko kiel relative nova branĉo de lingvistiko, evoluiganta dum lastaj du jarcentoj, kiu transprenis de ekologio nociojn de ekvilibro, kunvivado kaj diverseco, aplikante ilin al la lingva situacio en la mondo. Dum la somera semestro la kursanoj pridiskutos la historion de planlingvoj kaj konatiĝos ankaŭ kun la strukturo de Esperanto kaj etimologio de Esperanta vortrezoro. Lingvistoj apogantaj la ekolingvistikan vidpunkton pritraktas la diversecon de lingvoj kiel protektindan valoron de la homara kultura heredaĵo, zorgas pri malgrandaj lingvoj kaj dialektoj kaj kritike okupiĝas pri lingva malegaleco en la nuntempa internacia komunikado – la fakto kiu rekte venigas ilin al la kampo de interlingvistiko.

### Gekursanoj sur la foto (de maldekstre dekstren):

*Unua vico:* Iva Ĉoza, Martina Frišĉić, Ana Kontrec, Maja Haraminčić, Petra Ratkajec;

*Dua vico:* scienca novicino Aleksandra Ŝukanec, Marija Ratković, Sanja Cvijanović, Ana Vuksanović, kursgvidanto Velimir Piškorec, Ana Koren, Monika Vranaričić;

*Tria vico:* Ivan Petric, Tomislav Ŝušmak, Marija Mikić, Matija Hlebar, Nina Ban, Dalibor Dujmić.



## EPOKO DE VORTAROJ

✍ Josip Pleadin

Sen bonaj vortaroj apenaŭ iu lingvo povus travivi. Tion ege konscias ankaŭ esperantistoj, kiuj en epoko de elektronika komunikado, tamen decidis kompili kaj eldoni libroforman leksikologian verkon. Ŝajnas, ke ni vivas en epoko de vortaroj. Lastatempe aperis almenaŭ du gravegaj Esperantaj vortaroj, kiujn serioza ĵurnalisto devas mencii kiel ekzemplon: la germana "**Großes Wörterbuch Deutsch-Esperanto**" de Erich Dieter Krause kaj la ĉina "**Ĉina-Esperanta Vortaro**" de Wang Chongfang.

La unua estas verŝajne la plej ampleksa vortaro de Esperantujo, enhavanta 160.000 kapvortojn lokitajn sur 1679 paĝojn. Eldonis ĝin renoma eldonejo kaj la aŭtoro ankaŭ estas bone konata vortaristo. Tamen, Esperantujo akceptis tiun eldonon denove en sia stilo: atakante la aŭtoron pro rimarkitaj mankoj. Neniu starigis la demandon: ĉu iu kapablis fari ion pli bonan? Similan aferon travivis ankaŭ la nova PIV antaŭ kelkaj jaroj? Kian akcepton oni preparis por la duemenciita ĉina vortaro, ankoraŭ ne evidentiĝis en la informkanaloj de Esperantujo. Sed evidentas, ke la aŭtoro Wang Chongfang faris laboron kiun neniu alia volis fari, eĉ se iu(j) kapablus. Li bezonis longajn 14 jarojn por 1200-paĝa kaj preskaŭ 100.000-artikola vortarego.

Kial entute mi rakontas al vi pri la vortaroj? Guste por eviti la eblecon de kritikado kiam jam estos malfrue. Ĉiu bone informita esperantisto scias, ke la informon pri simila projekto en Kroatio lanĉis "Tempo" dufoje: en aprilo 2002 kaj denove en majo 2004. Pri la komenciĝinta kompostado de granda Esperanta-kroata vortaro de eminenta kroata esperantistino kaj honora membro de UEA Lucija Borčić, ankaŭ mi skribis

en la enkonduko de la 11-a eldono de la poŝvortaro "10.000 vortoj" eldonita en 2004. Mi apartenis al malmultaj havintaj bonŝancon vidi la respektivan manuskripton, kaj mi admiris la aŭtorinon provante ĉiamaniere realigi la eldonadon de la impona libro kaj instigante la aŭtorinon kaj KEL fari ĉion eblan por eldoni la verkon ĝuste en la jubilea jaro 2008. Mi pasigis 200 laborhorojn ĉe mia komputilo kompostante la tekston, sed finfine la aŭtorino tamen elektis alian vojon. Kaj la vojo elektita venigis nin tre proksimen al publikigo de la epoke grava verko por kroataj esperantistoj. La unuan informon pri ricevita rajto kopii la manuskripton (nun jam de ambaŭdirekta vortaro kiun "Tempo" de decembro 2007 anoncas kiel "Granda Esperanta-Kroata Vortaro" kaj "Granda Kroata-Esperanta Vortaro") kaj trakti pri la eldono ekskluzive kun la renoma eldonejo "Izvori", lanĉis Spomenka Štimec en la kunsido de la estraro de Kroata Esperanto-Ligo la 10-an de decembro 2007. Por ilustrati la amplekson de la vortaro, en "Tempo" estis prezentita specimena artikolo. Sub la radikvorto "**ŝip-**", Lucija Borčić mencias jenajn derivaĵojn: *ŝip-a, ŝip-e, ŝip-i, ŝip-ano, ŝip-anaro, ŝip-aro, ŝip-estro, ŝip-eto, ŝip-isto, ŝip-beko, ŝip-ekipisto, ŝip-rompi, ŝip-rompiĝo, ŝip-rompaĵo, ŝip-servi, el-ŝip-ejo, el-ŝip-igi, el-ŝip-igi, el-ŝip-igi, en-ŝip-igi, en-ŝip-igo, en-ŝip-igi, en-ŝip-igo, per-ŝip-i, per-ŝip-e, sur-ŝip-e, trans-ŝip-igi, aer-ŝip-o, aviadil-ŝip-o, balen-ŝip-o, batal-ŝip-o, bordo-ŝip-o, cisterno-ŝip-o, drag-ŝip-o, hospital-ŝip-o, kaper-ŝip-o, karbo-ŝip-o, kargo-ŝip-o, komerc-ŝip-o, kontener-ŝip-o, kosmo-ŝip-o, krozo-ŝip-o, batakrozo-ŝip-o, helpa krozo-ŝip-o, kurier-ŝip-o, lum-ŝip-o, plezur-ŝip-o, puŝ-ŝip-o, rad-ŝip-o, sklavo-ŝip-o, spaco-ŝip-o, submar-ŝip-o, transport-ŝip-o, trejno-ŝip-o, tren-ŝip-o, vapor-ŝip-o, vel-ŝip-o.*

Sume 57 diversajn derivaĵojn.

Mi nur provizore serĉis mankantajn vortojn kun la sama radiko. Kaj mi konsterniĝis! Mankas, ekzemple: *ŝipvojo* (pomorski put), *ŝiphaveno* (brodska luka), *riverŝipo* (rječni brod), *ŝipsarĝado* (utovar), *havenŝipo* (lučki brod), *militŝipo* (ratni brod; diference de *batalŝipo* = bojni brod), *militŝiparo* (ratna mornarica), *proviantŝipo* (brod za opskrbu), *glacirompa ŝipo* (ledolomac), *torpedŝipo* (torpiljar, torpiljerka), *(trans)oceana ŝipo* (prekoceanski brod), *fiŝista ŝipo* (ribarica, ribarski brod), *fruktoŝipo* (brod za prijevoz voća, *usp. bananŝipo*), *pilotŝipo* (pilotski brod za navođenje u lukama), *paŝaĝerŝipo* (putnički brod), *doganŝipo* (brod carinske ispostave), *ŝippasaĝero* (putnik na brodu), *ŝipkonstruado* (brodogradnja), *ŝipkonstruejo* (brodogradilište), *ŝipfarejo* (brodarica, brodogradilište malih brodova), *ŝipkonstruisto* (brodograditelj), *ŝipripoj* (brodska rebra), *ŝipŝelo* (brodska oplata), *ŝipstirilo* (kormilo, *usp. rudro*), *nuklea submarŝipo* (nuklearna podmornica), *krozŝipo* (krstaŝ, kruzer), *milita kruzŝipo* (krstarica), *kirasŝipo* (oklopnjača), *ŝipkiraso* (brodski oklop), *ŝipartilerio* (brodska artiljerija), *komandŝipo* (zapovjedni brod), *ŝipoficiro* (brodski ĉasnik), *militŝipa oficiro* (ĉasnik na ratom brodu, vojni ĉasnik), *kanonŝipo* (topovnjača), *ŝipkanono* (brodski top), *levŝipo* (brod-dizalca), *ŝippereo* (brodolom), *ŝippereulo* (brodolomac), *ŝipdrono* (potonuĉe), *ŝipdroninto* (utopljenik), *aerŝipo* (aerostat, *usp. zepelino*), *pramŝipo* (trajekt), *fantomŝipo* (ukleti brod), *flagŝipo* (zapovjedni brod, admiralski brod), *komercŝiparo* (trgovaĉka mornarica), *ŝipmotoro* (brodski motor), *savŝipo* (spasilaĉki brod), *ramŝipo* (brod-ovan, brod za probijanje oplata i oklopa drugih brodova), *malpeza miliŝipo* (laki



ratni brodo), *ŝipfenestro* (brodska okno), *ŝipkorpo* (trup broda), *ŝiplanĉo* (porinuĉe broda u more), *ŝipruino* (brodska olupina), *ŝipkompanio* (brodarska tvrtka), *ŝipspino* (kobilica broda), *ŝiplanĉejo* (navoz), *ŝipkrozado* (krstarenje, kružno putovanje brodom), *ŝipfrajtaĵo* (brodarina), *ŝipa frajtletero* (brodski teretni list), *drakŝipo* (vikinŝi brodo sa zmajevom glavom na pramcu), *motorŝipo* (motorni brodo), *ŝiparestro* (zapovjednik mornarice, admiral), *ŝipkonvojo* (brodski konvoj), *ŝipareto* (flotila), ktp. El la mankantaj vortoj multaj estas esence gravaj kaj nemankendaj en enciklopedia vortaro, kia celas esti la vortaro de Lucija Borĉić. Ne estas necese senkritike kaj konsekvence sekvi nur la difinojn de PIV, sed konsulti ankaŭ aliajn vortarojn. Plurajn difinojn mi trovis ekz. en "Esperanta bildvortaro" de Rüdiger Eichholz, kiu estis kreita surbaze de Duden-vortaroj. Multaj difinoj troviĝas ankaŭ en alinaciaj vortaroj, multaj estas troveblaj en la paĝoj de diversaj revuoj, ekz. de la ekzemplodona "Monato", kaj pluraj troviĝas ankaŭ en la nekompleta manuskripto de mia vortaro kroata-Esperanta, kiu, interalie, troviĝis ankaŭ ĉe la altestimata aŭtorino Borĉić por kontrolo, antaŭ ol ŝi komencis verki siajn vortarojn.

Nesufiĉe klaraj ŝajnas al mi la difinoj de *velŝipo* (jedrenjak), diference de *velboato* (jedrilica), kio en la vortaro de Borĉić egalas: *velŝipo* = jedrenjak, jedrilica. *Lumŝipo* estas simple "brodo svjetionik". *Karboŝipo* ne egalas al *kargoŝipo* kion oni povas konkludi el la manuskripto de Borĉić. *Radŝipo* estas specifa vaporŝipo (ekz. en la rivero Mississippi), kies vapormaŝino movas la grandajn padelhavajn radojn. En la vortaro de Borĉić multfoje temas pri tro detalaj nacilingvaj klarigoj ne ĉiam necesaj, kio malŝparas la spacon, dum aliflanke mankas multaj vortoj kiel mi trovis per ne plenatenta serĉo.

Antaŭ ol entrepreni eldonon de tiu grandega kaj certe necesega vortaro, eblas fari plurajn kompletigojn, se la aŭtorino tion permesos. Ankaŭ sen ia ajn ŝanĝo, Lucija Borĉić meritas lokon inter la escepte sindonaj laborantoj por komuna afero. Ŝia vortaro (fakte: vortaroj!) estas laborrezulto kiun, mi diru sincere, ĉi-momente neniu en Kroatio povas superi. Laŭ la ricevita informo, "Izvori", la eldono elektita de la aŭtorino mem, postulas 25.000 kunaojn (ĉ. 3.400 eŭrojn) da iniciata kapitalo, dum la reston financos la eldonisto. Ĉar la aŭtorino liberigas la eldonisto pagi la aŭtorajn rajtojn, la publikigo ŝajnas tute reala. "Izvori" estas renoma eldonisto, posedata de esperantisto Damir Mikuličić, kiu certe kapablas bonkvalite fari la


laboron. La prezo postulata ne estas granda, kaj evidentas, ke per abonoj kaj donacoj oni povus kolekti la postulatan sumon. Aliflanke, la eldonisto certe kalkulas ankaŭ pri vendebleco de la vortaro al esperantistoj en aliaj eks-jugoslaviaj landoj, ĉar ĝi estos la sola tiel ampleksa helpilo, pro la lingva simileco uzebla ankaŭ en tiuj regionoj. Jam nun, antaŭ ol la abonkampanjo estas lanĉita, mi invitas ĉiujn kroatajn kaj eks-jugoslaviajn esperantistojn pensi pri la abono, kiu permesos al tiu ŝipo naĝi plenvele.

Kaj ĉe la fino, mi ne povas ne mencii, ke la 4-an de januaro 2008 eldoniĝis en Kroatio ankaŭ specifa - brajla - vortaro Esperanta-kroata kaj kroata-Esperanta. Pri ĝi legu sur la paĝoj 24-26 de nia revuo.

## KROATA POŝTO INFORMAS

Per sia letero de la 7-a de januaro, s-ro Hrvoje Lonĉar, estro de la Merkatada servo de Kroata Poŝto, informis Kroatan Esperanto-Ligon, ke la konstanta Komisiono por elekto de motivoj, pentraj kaj grafikaj aranĝoj de poŝtmarkoj diskutis pri la propono de KEL, kaj decidis eldoni en 2008 okaze de la 100-jara jubileo de Esperanto en Kroatio, specialan poŝtkarton.

 <b>HP-Hrvatska pošta d.d.</b> Autićeva 13, Zagreb		DIREKCIJA POŠTA Sektor marketinga i prodaje P.P. 514 10002 ZAGREB		Telefon: (01) 4881 047 Telefaks: (01) 4881 048 e-mail: marketing@posta.hr	
Datum: 07. 01. 2008. Broj: DS/1 - 343/07. Povezet: Program izdavanja poštanskih marki u 2008. godini		HRVATSKI SAVEZ ZA ESPERANTO a/1 gosp. R. Mišlerić Kneza Mislara 11/9 10000 Zagreb			
Poštovani gospodine Mišlerić, subvencionirano na doprinosu za razmišljanje na izdavanje prigodnih poštanskih marki u povodu stote obljetnice esperanta u Hrvatskoj. Kroz ovu ovu prikladu kulu izmimo Vas obavještavam da je Povjerenstvo za izbor motiva, likovnih i grafičkih osmišljavanja poštanskih marki razmotrilo Vaš prijedlog, te ga usvojilo u Program izdavanja poštanskih marki i doprinosa u 2008.g. Hrvatska pošta će provoditi 100. obljetnicu esperanta izdajući prigodne poštanske doprinosa. Radujemo se vaŝoj nepodrijetljivoj suradnji na realizaciji ovog projekta. S poštovanjem,  Hrvoje Lonĉar, dipl. ing.					



Fine de 2007 ĉe "Grafokom" aperis libreto "*Esperanto - mia akompananto*" de Milan Sudec. Ŝi estis anoncita jam en la tria numero de "Zagreba Esperantisto". Temas pri memuara prozo, kiu parolas pri personaj travivaĵoj de simpla esperantisto.

**Prezo: 40,00 kn / 6,00 eŭroj (poŝtkostoj enalkulitaj.**  
Mendebla ĉe la redakcio.



# SEK 50-jara - ĉu jam?

✍ Vanja Radovanović  
📷 Josip Pleadin



“SEK iĝos 50-jara – ĉu jam?”, tiu demando venis al mia kapo antaŭ 2 jaroj, kiam SEK-anoj komencis prepari la jubileon. Vere mirinda afero, pensis mi. En la jaro 1986 kiam mi partoprenis porkomencantan kurson kaj iĝis membro de la klubo, SEK ankoraŭ estis “junulo”, nur 29-jara. Kaj nun ĝi jam festas duonjarcentan jubileon! Rapide kalkulante mi konstatis, ke SEK kaj mi kunas jam 21 jarojn ... do, preskaŭ duonon de mia ĝisnuna vivo. Kaj SEK estas tre grava fakto en mia vivo: mian edzinon mi ekkonis en la klubo, plej multo el miaj/niaj nunaj amikoj estas SEK-devenaj, kun SEK-anoj mi unuafoje vojaĝis eksterlanden en mia vivo, festis mian diplomon, naskiĝon de la infanoj. Kaj SEK ne influis tiel forte nur mian vivon, sed ankaŭ la vivojn de multaj aliaj

## SUR LA FOTOJ:

1) Diversgeneraciaj prezidantoj de Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo sur la festa podio en Eŭropa Domo; 2) Festparolis la unua prezidanto de SEK Vjekoslav Morankić; 3) Kaja Farszky gvidis la publikan prezenton, interalie sur la scenejo de la ĉefa zagreba placo dum koncerto de Jomo (4).

homoj. Jes, la graveco de SEK estas ankaŭ en la fakto, ke ĝi estas unu el la plej fortaj fontoj de zagrebaj kaj kroataj esperantistoj, ke la membroj de SEK fondis PIF-on, IKS-on kaj Urban festivalon ... sed al multaj anoj de SEK la klubo kaj ĝiaj membroj estis iusenca “vivlernejo”, en kiu multaj el ili realigis aferojn kiujn alimaniere certe ili ne farus. Ekde foraj vojaĝoj kaj lokaj semajnfinaj ekskursoj ĝis internaciaj amspertoj, teatrumado, instruado, verkado por gazetoj ... multon oni povis fari kaj lerni en kaj pere de SEK. Eĉ tiuj “tedaj” administraj taskoj per kiuj okupiĝis prezidantoj kaj sekretarioj donis al ili certan vivsperton uzeblan en la posta vivo. Laŭ mi, tiaj “survojaj” spertoj, ne ĉiam rilataj al Esperanto, estas tre gravaj por junaj homoj ... ne nur pro la fakto, ke ili pliriĉigis la vivojn de multaj



junuloj, malfermis multajn pordojn por ili, sed ankaŭ pro tio, ĉar tiamaniere la kono pri Esperanto estis disvastigita tra tuta Zagrebo kaj Kroatio. En Kroatio mi neniam renkontis ajnan personon kiu aŭdis nenion pri Esperanto ... kaj dum mia 6-jara vivo en Aŭstrio estis tute male, pli multnombraj estis tiuj kiuj eĉ la vorton "Esperanto" ne konis. Dum la 80-jaroj preskaŭ ĉiu bone edukita persono renkontita ie ajn en Zagrebo havis iun gepatron, parencon, najbaron aŭ amikon, kiu iam ajn faris almenaŭ porkomencantan aŭ semajnfinan kurson kaj estis membro de la klubo almenaŭ jaron aŭ du.

Ĉiam estas malfacile skribi tekstojn por tiusencaj jubileoj – oni povas aŭ ĉiumaniere laŭdi la jubileanton (vidu supre!) aŭ iel statistike pritrakti la aferon kaj doni listojn de prezidantoj, membronombro, listigi homojn kiuj gvidis kursojn ... aŭ simple tra siaj personaj spertoj doni la etoson en iu certa tempo de la jubileanta vivo. Mi decidis fari la trian (espereble iu alia pritraktos ankaŭ la statistikajn parton!), montri la klubon dum jaroj tra miaj personaj spertoj. Ni eku, do ...

### Jaro 1985

Tiam mi ankoraŭ ne estis membro de SEK, sed mi ja konis kelkajn klubanojn. Du miaj fakultataj koleginoj aktivis en ĝi kaj estis membroj de la Drama grupo. Ili invitis min veni al sia prezentajo kaj poste mi ekkonis ankaŭ aliajn membrojn de la grupo. Tiam mi estis studento de la dua jaro, ankoraŭ ne okupiĝis pri ajna alia afero krom studado kaj fojfoje iu montmigranta ekskurseto, kaj ĉiuj tiuj homoj aspektis al mi tre strange. Ili preparadis teatraĵojn, kio ŝajne estis amuza afero ĉar ĉiuj multe ridis, ŝercis, amindumis ... ili ankaŭ planis prezenti ĝin en Francio kaj Belgio, kaj tiutempe la ideo al mi sonis kiel unu ekspedicio al Antarkto. Stranguloj, pensis mi, eĉ mi ne timis iomete vidante tiel komunikemajn kaj direktajn homojn. Sed, la semo kaj scivolemo jam estis en mi ...

### Jaro 1986

... kaj en aŭtuno 1986 mi parto-

prenis komencantan kurson. La tuta grupo komence havis eĉ 65 homojn. Oni duonigis nin en du grupojn kaj fine pli ol 20 restis en la klubo. La etoso estis gaja, la klubejo en Amruŝeva strato ĉiam plena, vendrede okazis regulaj prelegoj, homoj parolis pri aranĝoj, ekskursoj ... ĉio kaj ĉiu estis plena da entuziasmo. Nur, mi ankoraŭ ne sentis min kiel membro de tiu granda gaja amaso, ankoraŭ mi ne estis sufiĉe malfermita por akcepti tion kaj mi ne sciis kion fari kun la novlernita lingvo kaj kun novaj konatoj. Tiu vogleco, malfermeĉo kaj vivĝuo de SEKanoj estis mirinda, ili foje aspektis al mi kiel eksterteruloj komparante ilin kun pigraj "averaĝuloj". Sed, mi ankoraŭ ne estis preta akcepti kaj intense ĝui tian vivon, kaj iom post iom mi ĉiam pli kaj pli malofte venadis al la klubejo, sed ...

### Jaro 1987

... komence de la jaro iu demandis min ĉu mi deziras iĝi membro de la Drama grupo. "Mi? Kial? Mi neniam ...", mi provis respondi. Sed la kunparolanto esti pli rapida kaj pli laŭta: "Ne zorgu, vi povas tion, ni helpos al vi, vi vidos, estos amuze kaj vi faros ion novan en via vivo. Post 4 monatoj ni vojaĝos al Berlino kaj poste ni partoprenos IJK-on en Krakovo ...". Iel oni konvinkis min kunlabori, sed tiu promesita vojaĝo estis ankoraŭ sciencfikcia romano por mi, mi tute ne planis tien vojaĝi, eĉ mi pretintus rifuzi se iu hazarde ofertus al mi kunvojaĝi. Kaj, jes, oni ofertis al mi tion. Kaj mi devis nepre iri, diris ili, unu el la rolantoj ne povis vojaĝi, eĉ mono por subteni min aperis de iu sekreta klubo-fondaĵo ... kaj mi ne plu povis diri "ne" kvankam mi ankoraŭ demandis min mem "Ĉu mi vere iru aŭ estas tamen pli bone resti hejme kaj ne riski tian vojaĝon?", vojaĝon al foraj landoj, tiam ankoraŭ malfermitaj kaj malantaŭ la "fera kurteno". Unue mi ne povis dormi, ĉar mi pensis kiel eviti la vojaĝon, poste mi ne povis dormi ĉar mi pensis kion mi devas paki por la vojaĝo kaj, fine, mi ne povis dormi pro simpla ekscitiĝo, parte kun bonaj pensoj, parte kun iom da timo. La vojaĝo ekis, pri ĝi mi povus rakonti dum horoj kaj pleniĝi

20 paĝojn da teksto ... Iam, malfrue vespere de la unua tago, starante apud aŭtoŝoseo ie en Ĉehio kaj ankoraŭ ne sciante kie ni tiumokte dormos, mi sentis min tre bone kaj pensis: "Vidu, tamen tio estas amuza!". Poste mi neniam plu en mia vivo dubis ĉu vojaĝi ien ajn – simple mi ekvojaĝis kaj ĝuis.

La tuta vojaĝo estis granda sukceso (nur aktoradon mi ne tre emis, speciale tiun dum IJK kiam spektis nin preskaŭ 1000 homoj en grandega sporta halo), ekde vizito al tiama orienta Berlino ĝis unuaj internaciaj simpatioj kaj amoj. Iam, babillante samtempe kun iu ruso, lia amiko el Ĉinio kaj iu slovenino, ankaŭ Esperanto ricevis iun sencon kiun mi ne vidis dum kursaj lecionoj. Revenante hejmen mi sentis min kiel vera membro de la Drama grupo kaj la klubo. Kaj tiam iu proponis ...

### Jaro 1988

... ke mi helpu ĉe organizado de IJK en Zagrebo, eĉ kiel gvidanto de la faka programo. Granda entuziasmo regis en la klubo, multaj homoj kunlaboris en tiu ondo da entuziasmo kiu okupis ĉiujn ... jes, ne ĉiam estis facile, pluraj miaj ideoj kaj ideoj de aliaj SEK-anoj malaperis aŭ fine ne realiĝis, ni ĉiuj estis tre lacaj post la kongreso ... sed la kongreso estis tre bona, kun bonega etoso kaj centoj da homoj el la tuta mondo ... kaj la entuziasmo nia kaj ilia estis nekredebla, ni ĉiuj havis la impreson, ke ni faris tre bonan aferon. Post tiu kongresa semajno mi ne plu sciis normale vivi, ripozi pli longe ol 2 minutoj je unu loko aŭ esti sola almenaŭ duonon da horo ... kaj kion nun mi kaj ni ĉiuj faru? Kiun celon ni havu post kiam ni faris tiel grandan laboron?

### Jaro 1989

Plejmulto da homoj tamen restis en la klubo kaj ne perdiĝis en tiu postkongresa "trankviliĝo", la etoso en la klubo estis daŭre bona ... kaj ideala por semajnfinaj montmigravaj ekskursoj, ni ja ne plu povis vivi sen iu komuna agado. Kaj ni ekskursis amase kaj tre ofte, ĉiun semajnfinojn ... kaj iel mi iĝis la ĉefa organizanto. Eĉ iu starigis

min kiel estron de la ekskursia sekcio. Kompreneble, nur tiamaj SIZ kaj USIZ kiuj financis la klubon interesiĝis pri la sekcio kaj postenoj, sed la ekskursojn mi tamen tre ofte organizis. Kaj baldaŭ iu proponis al mi, ke mi estu prezidanto de la klubo. "Ne ŝercu", diris mi, "mi ne povas tion fari." Kaj aliaj respondis "Ne zorgu, vi povas tion, ni helpos al vi, vi vidos, estos amuze kaj vi faros ion novan en via vivo." Kaj mi iĝis prezidanto. Tiujare mi partoprenis IJK-on en Kerkrade (jam la trian!), biciklis kun BEMI-anoj tra tuta Germanio, denove kunlaboris en la Drama grupo kaj aktoritis antaŭ centoj da homoj ... mi spiris la vivon per plenaj pulmoj, samkiel la plejmulto da SEK-anoj tiam, pli frue kaj pli malfrue.

## Jaro 1990

Pri mia prezidanta jaro mi ne volas multe skribi. Nenio tre bona aŭ malbona okazis, la klubo bone funkciis kvankam ĝi faris nenian grandan paŝon en disvastigo de Esperanto aŭ plifortigo de la zagreba kulturo. Post unu jaro mi iĝis sekretario kaj "ĝuis" paperajn taskojn kaj administradan laboron. Ial la ĝenerala entuziasmo en la klubo malkreskis. Malpli da homoj venadis al kursoj, malpli al klubaj programoj ... la ejo estis daŭre plena, sed nun oni jam povis tute bone spiri tie kompare kun la antaŭa tempo. Jes, la malbonodoro de la milito jam ŝvebis en la aero ...

## Jaro 1991

Komenciĝis la milito kaj la tuta aktivado iel malintensiĝis. Eĉ la ejon en Amruševa ni devos forlasi, pri kio daŭre cirkulis onidiroj, sed, feliĉe, tio ankoraŭ ne okazis en tiu tempo. SEK-anoj iĝis malpli laŭtaj, malpli viglaj, pli fermitaj ... neniu sciis kien gvidos nin la estonteco kaj neniu kuragiĝis fari grandajn planojn.

## Jaro 1992

La krizo en la klubo daŭre regis, kaj ne nur en la klubo, sed ĝenerale, en la tuta socio. La milito iĝis parto de ĉies vivo kaj

neniu multe pensis pri aferoj kiaj estis Esperanto, kulturo kaj vivĝuo. Estis grave vivi kaj esti sekura.

## Jaro 1993

La plej malbela parto de la milito jam estis malantaŭ ni, sed la postmilita etoso ankaŭ ne estis favora al Esperanto. "Ĉu oni povas ion perlabori per ĝi?", estis la plej ofta demando. Kaj la respondo "Jes, vivspertojn, amikojn, konon de aliaj landoj kaj homoj" - ne estis tiu kiun plej granda parto da junuloj deziras aŭdi. "Mono" estis la magia vorto, sed ĝn SEK ne povis oferti. La monsituaĵo de la klubo malboniĝis, ĉesis pli-malpli konstanta alfluo de ŝtata kaj urba mono en la kason de SEK, kaj neniu sciis kion fari por ŝanĝi tion.

Ankaŭ mi persone ne povis vivi plu nur per entuziasmo kaj havinte 30 jarojn, mi ne plu povis/emis vivi kun miaj gepatroj, sed mi/ni ne havis sufiĉe da mono por iel ajn solvi tiun problemon. Fine mi trovis iun solvon, kiun kaj mi kaj miaj gepatroj devis akcepti

- mi eklaboris eksterlande, en Aŭstrio. Mi forlasis la klubon, kiu tiam havis malcertan estontecon ...

## Jaroj 1994-1999

Dum tiuj jaroj mi laboris en Vieno, ĝuste tiom for, ke mi povu ofte viziti Zagrebon semajnfine. Por mi ne estis granda problemo ekveturi el Vieno je 14h00 vendrede postatgmeze, por esti ĝustatempe en la klubejo por vespera programo. Venis novaj homoj, la klubo ne estis tiel plenplena kiel dum la 80-aj jaroj, sed novaj vizaĝoj plenigis la ejon kaj la vigla etoso denove regis. Nova aranĝo, MIRO, estis lanĉita kun granda sukceso. Sekvis IJK en Rijeka post kiu, bedaŭrinde, "perdiĝis" la tuta generacio de SEK-anoj, laca pro tia aktivado kaj plena da aliaj vivplanoj. Denove venis la tempo por nova generacia ŝanĝo ...

## Jaro 2000

Por mi ankaŭ venis la

## PUBLIKE PRI LA JUBILEO

*Dag Treer*

La 7-an de decembro je la 9h45, prezidanto de SEK Dag Treer gastis en la elsendo de Radio Sljeme.

La 7-an de decembro je la 11h00 okazis ĵurnalista konferenco en la SEK-klubejo, kiun gvidis Tina Tišljar kaj Dag Treer.

La 7-an de decembro je la 21h00 en la unua programo de Kroata radio estis elsendita intervjuo kun Tina Tišljar, Dag Treer kaj Spomenka Štimec.

La 8-an de decembro en la tagĵurnalo "Vjesnik" aperis du artikoloj: pri la 50-jara jubileo de SEK, respektive intervjuo kun la sekretariino de Kroata Esperanto-Ligo okaze de la jubileo.

La 10-an de decembro je la 8h45 en la televida elsendo "Dobro jutro Hrvatska" en la unua programo de Kroata televido gastis Kaja Farszky kaj franca kantisto-esperantisto, kiu kantis en Esperanto anoncis sian samvesperan koncerton sur Placo de banuso Jelačić.

Pri la jubileo aperis artikoloj ankaŭ en "Tempo", oficiala gazeto de KEL dufoje: en la numeroj 95 kaj 97.

La januara numero de "Esperanto revuo" de UEA sur la paĝoj 20 kaj 21 aperigis longan artikolon "La plej bela tago en la vivo" verkita de Spomenka Štimec.

Konstantaj informoj estis akireblaj en la retpaĝaro de sek: [www.sek.hr](http://www.sek.hr).



tempo por ŝanĝi la personan vivon – mi revenis al Zagrebo, edziĝis, naskiĝis mia filo ... kaj mi revenis al SEK, je ĝuo mia, tiu de mia edzino kaj la klubanoj. Kaj estis sufiĉe da laboro farenda: la Drama grupo estis revivigita, la aranĝo MKR estis transprenita de la aŭstra junularo, aperis la unua retpaĝo de SEK ... Malmulte da mono kaj malforta alfluo da novaj membroj estis daŭraj problemoj, sed la klubo sukcesis daŭrigis la aktivadon.

### Jaro 2001

Por mi persone tiu jaro ankaŭ estis grava, ĉar kun la naskiĝo de mia filo mi demandis min ĉu denaske instrui Esperanton al li aŭ ne. Mi demandis aliajn kiuj jam faris tion kaj ili respondis "Ne zorgu, vi povas tion, ni helpas al vi, vi vidis, estos amuze kaj vi faros ion novan en via vivo". Kaj mi faris ankaŭ tiun paŝon ... kaj ekde la jaro 2001 SEK ricevis sian plej junan membron kaj foje plorantan vendredvesperan vizitanton.

Tiutage SEK-anoj ricevis ankaŭ novan aranĝon – Familian MKR-on. Tamen tiujare la UK estis la plej granda evento por SEK-anoj. Multaj kunlaboris en la programo por "plenkreskuloj", pluraj ankaŭ en la junulara programo, Zagrebo denove brilis per verda fajro ... sed ankaŭ post la UK okazis la sama problemo, la klubanoj laciĝis kaj forlasis la klubon kaj iu forta kaj multnombra generacio ankoraŭ ne venis. Sed, la klubo travivis ankaŭ tion.

### Jaroj 2002-2004

Dum tiuj jaroj SEK festis sian 45-jariĝon. Estis bele vidi multajn konatajn vizaĝojn kiuj venis al la festo. Estis ankaŭ bela sperto kunlabori en la plej multe ludita teatraĵo en la tuta historio de la Drama grupo, "Instrukcioj por simpla vivo harmonie kun la naturo, parto la unua". La malbela sperto estis la translokiĝo el Amruŝeva strato al Mislavova ... Multaj opiniis, ke tiu translokiĝo mortigos SEK-on. Kvankam ankaŭ la nova ejo troviĝis urbocentre, la iamaj tri neforgeseblaj ĉambroj en Amruŝeva kun rigardo al la ĉefa placo estis neeviteblaj por ĉiuj SEK-anoj dum jardekoj. Dum ĉiu veno

al la urbocentro, oni povis viziti la klubon almenaŭ por 10 minutoj, por vidi kio novas, renkonti amikojn antaŭ ol iri kinejon, koncerton aŭ simple interŝanĝi klaĉojn antaŭ vespera kafevizito. Kaj la nova ejo postulis vere intence iri tien ... kaj la ejo estis pli malplena ol antaŭe.

### Jaroj 2005-2006

Por mi persone tiuj jaroj donis nedeziritan, sed ankaŭ neeviteblan malproksimiĝon inter SEK kaj mi. Naskiĝis mia filino kaj evidentiĝis, ke ne estas facile fari multon dum libera tempo kun du infanoj. Ankaŭ niaj familiaj vizitoj al la klubo malfortiĝis ... Mi deziris kunorganizi la 50-jaran feston kaj havis plurajn ideojn, sed kun ĉiutagaj familiaj taskoj kaj pli forta premo venanta el mia laborejo, la libertempo simple malaperis kaj mi malgaje konstatis, ke mi ne povas fari multon. Sed, dank' al SEK-anoj kiuj travivis ĉiujn ŝanĝojn dum la lastaj jaroj - SEK tamen festis!

### Jaro 2007

Jes, finfine venis la jubileo. SEK festis ĝin, per sukcesa prezentado de la Drama grupo, montmigra ekskurso kaj solena festo en la plenplena "E"ropa domo", kun sekva pli "familieca" festo en la klubbejo. SEK denove montriĝis vigla kaj gaja, novaj vizaĝoj donis ankaŭ pli da aktivecoj, novajn ideojn kaj planojn ... jes, venis la tempo por nova ŝanĝo kaj nova generacio.

### Jaro 2008

Ni vidis kion donos al SEK kaj mi persone tiu ĉi jaro, sed unu afero estas tutcerta – SEK daŭre vivos kaj progresos ... kaj espereble ankaŭ mi povos almenaŭ iomete helpi tion. Mi ne scias kiam venos la fino de mia aktivado en la klubo (restis nur 29 jaroj ĝis la momento kiam mi festos 50-jariĝon en SEK), sed mi certas, ke SEK festos sian 100-jariĝon ... Ne gravas kiel kaj kiu festos ĝin, sed mi estas konvinkita, ke tiu fonto da entuziasmo kaj aktivado daŭre pliriĉigos kaj la Esperantan movadon kaj la vivon de zagrebaj gejunuloj!

## KIEL NI FESTIS?

### ☞ Kaja Farszky

La festo daŭris tri tagojn kaj preskaŭ 200 homoj, iamaj, nunaj kaj estontaj SEK-anoj, partoprenis ĝin.

La unuan tagon, la 8-an de decembro 2007 en Centar za kulturu Peŝčenica, estis ludita teatraĵo "Galaksia krosziĝo 'Ludoviko' en epizodo: La muro de la mallumo" de la fama Drama grupo de SEK, aŭtorita de Vanja Radovanović. Ĉeestis ĉirkaŭ 50 spektantoj. Laŭ diro de nia prezidanto Dag: "po unu homo por ĉiu kluba jaro".

La duan tagon, la 9-an de decembro 2007, sekvis ekskurso al montkabano "Hunjka" en Medvednica. Ĝin partoprenis 26 homoj. La vetero belegis kaj ni ĉiuj sufiĉe fortis por la montgrimado kaj post 2 horoj kaj duono ni atingis nian celon. En la montkabano nin amuzigis Neven Mrzlečki per sia ludado kaj kantado.

La lasta tago, la 10-a de decembro 2007, plenis je programoj:

Matene gastis en TV-elsendo "Dobro jutro, Hrvatska" Kaja Farszky kaj la franca muzikisto Jomo. Ili parolis pri Esperanto kaj kvindekjariĝo de SEK. Jomo per sia ludado kaj kantado anoncis kaj invitis la spektantojn al vespera koncerto, kiu okazis je la 19h30 sur la ĉefa placo. Li kantis plurlingve kaj brile informis pri Esperanto.

Post la ĉefplaca koncerto ĉirkaŭ 150 iamaj membroj kolektiĝis en *Europa Domo* por ĝui kunestadon, aŭdi pri la kluba vivo kaj spekti la DVD-filmon pri la historio de SEK, kiun kreis Kruno Tiŝljar. Festparolis Vjekoslav Morankić, Zlatko Tiŝljar, Ivan Špoljarec, Ankica Jagnjić, Vanja Radovanović kaj Mea Bombardelli. Tra la programo gvidis nin Tina Tiŝljar kaj Dag Treer.

Dankon al ĉiuj kiuj helpis al ni organizi la feston. Dankon ankaŭ al ĉiuj kiuj venis kaj ĝojis kune kun ni!



### ESPERANTISTO DE LA JARO 2007

Proklamo de la Esperantisto de la Jaro okazas ekde 1998, kiam iniciatis ĝin la magazino "La Ondo de Esperanto". La projekto rapide populariĝis kaj akceptiĝis de la reprezentantoj de diversaj movadaj tendencoj kaj sendependaj kompetentuloj. Esperantisto de la Jaro 2007 fariĝis la germana esperantisto Peter Zilvar, prezidanto de Esperanto-Societo Sudharz kaj gvidanto de la Germana Esperanto-Centro en Herzberg. Li estis elektita inter 20 kandidatoj pro diversflanka agado por kaj per Esperanto en Herzberg, la Esperanto-urbo. Lia agado estis intensa ankaŭ en 2007: serio de altnivelaj seminarioj kaj ekzamen-sesioj, starigo de novaj ZEOj, imitinda loka informado pri Esperanto, evoluigo de kunlaboro inter Herzberg kaj Góra (Pollando) k.a.

### LA PAPO BONDEZIRIS EN ESPERANTO

Interrompinte en 2005 la tradicion de multlingvaj bondeziroj de sia antaŭulo Johano Paŭlo la 2-a, inter kiuj ĉiam troviĝis ankaŭ la Esperanta, Benedikto la 16-a revenis al ĝi dum Kristnasko 2006, kaj ankaŭ en sia kristnaska bondeziro en 2007 li mesaĝis al esperantistoj jene: "Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron". Tradicie gvidata de itala samideano Giovanni Conti, ankaŭ tiufoje sur Placo de sankta Petro troviĝis grupo de italaj esperantistoj kun alte levitaj paneloj kiuj konsistigis la vorton "Esperanto".

### ELEKTITA NOVA PREZIDANTO DE TEJO

La supozoj lanĉitaj dum la pasinta somero fariĝis realo. TEJO finfine ricevis novan prezidanton. La elekto okazis en la eksterordinara komitata kunsido de TEJO kunvokita jam pasintaŭtune. Ĝi okazis dum la Internacia Seminario en Würzburg (Germanio) la 29-an de decembro 2007. Prezidanto de TEJO iĝis Gregor Hinker el Aŭstrio,



kaj aliaj estraranoj Anna-Laura H. Wickström (ĝenerala sekretario, kiu tiun taskon transprenis jam en oktobro), Sergej Tyrin (kasisto), Rogener Pavinski kaj Vildana Delalić (estraranoj). El la antaŭaj estraranoj de TEJO neniu restis en la novelektita estraro.

### ONI ŜTELAS ESPERANTAJN FLAGOJN

Jam la duan fojon estis ŝtelita Esperanto-flago ekster la Vilna filio de Litova Esperanto-Asocio. Unufoje la Esperanto-flago pendigita ekster la enirejo de la oficejo malaperis pasintjare. Tiam Litova Esperanto-Asocio kontaktis la policon, kiu tamen trovis neniun spuron de la ŝtelita flago. Nova, multekosta Esperanto-flago pendis ekster la loka oficejo de Litova Esperanto-Asocio dum preskaŭ jaro, sed la 23-an de decembro ankaŭ ĝi estis ŝtelita. Aldone estis forŝirita de la muro la sildo de la filio de la oficejo.

### UK-STATISTIKO

La 93-a Universala Kongreso de Esperanto okazos, kiel konate, en Roterdamo de la 19-a ĝis la 26-a de julio 2008. Ĝis fino de januaro aliĝis ĉ. 900 kongresanoj el 52

landoj, inter kiuj plej multaj el Francio, Nederlando, Germanio, Japanio, Italio kaj Belgio.



### ESPERANTO EN LA ARABA MONDO

Por daŭrigi la araban agadon de UEA, la Estraro de UEA elektis komisionon, kiu ricevis la nomon Komisiono pri Agado en la Meza Oriento kaj Norda Afriko. Kvankam pro mallongeco oni verŝajne plu parolos ankaŭ pri araba komisiono, ĝia oficiala nomo estis revertumita konforme al la praktiko de Unuiĝintaj Nacioj. La kunordiganto de la komisiono estas Marie Helene Desert (Francio) kaj ĝia sekretario estas Renato Corsetti (Italio). Krome membras en ĝi Si Abdelkrim Boughoud (Maroko), Mohand Cherif Chelbi (Alĝerio), Samia Harir (Francio), Bachir Elmaghnia (Alĝerio), Wa'el el-Mahdi (Barejno), Gerrit Berveling (Nederlando) kaj Atilio Orellana Rojas (Nederlando). En la disvastigo de Esperanto en la araba mondo certe helpas ankaŭ "Lernu.net", la plej ampleksa multlingva instrua retejo per kiu eblas lerni Esperanton (en pli ol 30 lingvoj). Je sia kvinjarigo ĝi ricevis ankaŭ version en la araba, kiun kunkreis la teamo el Jordanio, Usono, Israelo kaj Saŭd-Arabio. Post longa serĉado, Erin Piatessi, respondeculo de la projekto, sukcesis trovi la 24-jaran jordaninon Hind Hussein, kiu konsentis helpi pri la traduko al la araba. La laboro komenciĝis printempe de 2007, kaj la ĉefa nefinita laboro rilatas la vortaron,

مرحبا بك في **lernu!**

**lernu!** هو موقع متعدد اللغات هدفه إعلام مستخدمي الإنترنت عن الإسبرانتو ومساعدتهم على تعلمه مجاناً وبسهولة.

إذا كنت جديداً هنا، نوصيك بقراءة كيفية البدء.

صفحات مهمة  
ادعم **!lernu**





pri kiu ekokupigis israela Lernuano Oded Gilad. En la tradukado al la araba kunlaboris ankaŭ Adel Dossary el Saŭd-Arabio. Kvankam la araba versio de "Lernu" jam estas plene funkcia, la teamo ankoraŭ hezitas grandskale reklami ĝin antaŭ ol la vortaro estos plene tradukita.

### BELARTAJ KONKURSOJ (1)

Kadre de la elektado de komisionoj kaj komisiitoj por nova trijara periodo la Estraro de UEA elektis ankaŭ la juĝantojn de la Belartaj Konkursoj. Kune kun prof. Humphrey Tonkin kaj Michela Lipari, respektive prezidanto kaj sekretario, ili konsistigas la Komisionon pri Belartaj Konkursoj. Inter la elektitoj estas pluraj laŭreatoj de la Konkursoj. Pri la verkoj de la unuopaj konkursaj branĉoj juĝas po tri ĵurianoj. Tiuj pri poezio estas Anja Karkkainen (Finnlando), Carmel Mallia (Malto) kaj Mao Zifu (Ĉinio). Pri prozo juĝas Gerrit Berveling (Nederlando), Donald Broadribb (Aŭstralio) kaj Konisi Gaku (Japanio), kaj pri eseoj Detlev Blanke (Germanio), Giancarlo Fighiera (Italio) kaj Gotoo Hitoshi (Japanio). La juĝantoj pri teatraĵoj estas Wera Blanke (Germanio), Paul Gubbins (Britio) kaj Giuliano Turone (Italio). La Infanlibron de la Jaro elektos Kitagawa Hisasi (Japanio), Jouko Lindstedt (Finnlando) kaj James Rezende Piton (Brazilo). La juĝantoj pri filmoj estas Roman Dobrzyński (Pollando), Brian Moon (Luksemburgio) kaj Francisko Veuthey (Nederlando). Por la branĉo de kantoj oni provizore ne elektis juĝantojn, ĉar en 2008 ne okazos konkurso en tiu branĉo.

### BELARTAJ KONKURSOJ (2)

Por la 59-a fojo la gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA, invitas partoprenantojn konkursi en jenaj branĉoj: POEZIO (maksimuma longo nefiksita), PROZO (maksimuma longo 200 x 65 karakteroj), TEATRAĴO (maksimuma longo ne fiksitaj), ESEO (teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo "Lingvoj: trezoro de la homaro"), FILMO (teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo. Daŭro 15-60 minutoj), INFANLIBRO DE LA

JARO (originala aŭ tradukita libro, presforme aperinta en 2007). Estos aljuĝitaj jenaj premioj: en branĉoj POEZIO, PROZO, TEATRAĴO kaj FILMO po tri premioj (230, 161 kaj 92 eŭroj), en branĉo ESEO "Premio Luigi Minnaja" kaj du aliaj premioj, en branĉo INFANLIBRO DE LA JARO unu premio (483 eŭroj). Premio "Nova talento" por la plej bona konkursanto neniam premiita - 161 eŭroj. Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseoj oni sendu ilin en unu ekzemplero; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Principe ĉiuj konkursaĵoj, escepte de infanlibroj kaj filmoj, akcepteblas rete. Ĉion adresu al: Belartaj Konkursoj de UEA, ĉe Michela Lipari, Viale Giulio Cesare 223, IT-00192 Roma, Italio; rete: *michela.lipari@tiscali.it*. plej laste ĝis la 31-a de marto 2008. Por filmo oni sendu unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2008.

### RUMANA KONTRIBUO AL LA SERIO "ORIENTO-OKCIDENTO"

La rumana prozverkisto Mircea Eliade (1907-1986), dank' al Eldonejo Bero, okaze de sia 100-a datreveno, estis prezentita al Esperantujo per unu el siaj plej famaj romanoj: "Fraŭlino Maitreyi". La romanon tradukis Ionel Oneț, kaj ĝi estas la unua rumana kontribuo al la Serio "Oriento-Okcidento" (n-ro 43), aŭspiciata de Universala Esperanto-Asocio. Esee antaŭparolis la verkon la prezidanto de UEA Probal



Dasgupta kaj la gvida rumana literaturisto Constantin Cublesan.

### LABORGRUPO POR LA LINGVOJARO

Por iniciati kaj kunordigi diversajn agadojn dum la jaro 2008 deklarita de la Unuiĝintaj Nacioj Internacia Jaro de Lingvoj, kiu koincidos kun la 100-a jubileo de Universala Esperanto-Asocio, la Estraro de UEA elektis specialan laborgrupon. Ĝi funkcios sub la gvido de vicprezidanto Ranieri Clerici kaj membras en ĝi Peter Baláz, François Bartsch, Charmian Common, Renato Corsetti, Barbara Despinaey, Mark Fettes, Josef Franquesa Sole, Andrej Grigorjevskij, Aleks Kadar, Lee Chong-Yeong, Ulrich Lins, Hokan Lundberg, A. Giridhar Rao, Hans Michael Maitzen, Ileana Schroeder kaj Renée Triolle. La Internacia Jaro de Lingvoj inspiris ankaŭ la elekton de la kongresa temo de la 93-a UK en Roterdamo (19-26 julio 2008), "Lingvoj: trezoro de la homaro".

### PUBLIKE PRI ESPERANTO

En "Puĉki kalendar

**Bjelovarsko-bilogorske županije 2008**" aperis du artikoloj pri Esperanto: "Kamo je nestao esperanto u Bjelovaru" (sur paĝoj 140-141) kaj biografio de fama bjelovara esperantisto Vilim Polašek (sur paĝo 44), ambaŭ verkitaj de Franjo Forjan

En "Puĉki kalendar

**Sisačko-moslavačke županije 2008**" aperis du-paĝa artikolo "Sto godina esperanta" (paĝoj 167-168), dediĉita al konata esperantisto Željko Takač kaj al 100-jariĝo de Esperanto en urbo Bjelovar, verkita de Franjo Forjan.

Pri la aktivecoj de kroataj nevidantaj esperantistoj informis: unua programo de **Kroata radio** en siaj elsendoj kaj rubrikaj: Matena programo "Kulturo vendrede", Matena kroniko kaj Tagkroniko; **Radio Sljeme** en aparta rekta elsendo, **Malferma radio** kaj **Zagreba radio** per raportoj; **Kroata televido** en sia unua programo en la elsendoj "Bonan matenon, Kroatio", "Kroatio vive" kaj "Departementa panoramo" kaj la revuo **"Večernji list"** en sia numero de la 5-a kaj 6-a de januaro.

Mi jam estis en Aŭstralio dufoje. En 1992/93 kiel interŝanĝa studento en la altlernejo Ocean Reef, kaj en 1995/96 por reviziti mian antaŭan gastigan familion. Nun mi volis reiri al Aŭstralio por viziti ilin. Sed mi ne plu ŝatis flugi. Ĉar, unue, flugado estas tre energi-malspara, do malbona por la medio, kaj due, oni ne vidas la landojn survoje. La nura avantaĝo pri aviadilo estas ĝia rapideco. Kontraŭe, la plej energi-ŝpara transportrimedo estas la biciklo, kiu ankaŭ plej bone permesas malkovri la landojn kaj renkonti la homojn survoje. Mi do biciklos!

Lun tagon en majo 2005 tion mi decidis kaj tuj iris al la librovendisto por aĉeti librojn verkitajn de homoj kiuj dum pluraj jaroj biciklis ĉirkaŭ la mondo. Mi volis legi pri iliaj spertoj. Kaj ju pli mi legis, des pli mi estis konvinkita ke tion mi ŝatas. Nenio plu povis haltigi min bicikli al Aŭstralio. Por maltrafi la varmegon aŭ la vintron en Irano kaj la musonon en Hindujo, mi decidis ekvojaĝi en junio 2006.

Intertempe mi ankoraŭ laboris por ŝpari monon, samtempe mi preparis min. Mi vizitis kurson ĉe la universitato de Bazelo por lerni la persan lingvon. Tiel almenaŭ en Irano mi ne estos devigata paroli la anglan. Mi ekprogramis retpaŝon, ĉar mi volis raportari pri mia vojaĝo dum mi estos survoje kaj tiel resti en kontakto kun miaj parencoj kaj amikoj. Kaj dum la duona jaro antaŭ mia ekiro, mi preparis mian ekipaĵon. Mi aĉetis mapojn, vizojn por Irano kaj Pakistano, tendon, dormsakon, kaj plej grave mian ruĝan biciklon, kiu devus porti min al Aŭstralio. Mi vakciniĝis, mi malsubskribis mian laboron, mi malluis mian loĝejon.

La 24-an de junio 2006 mi estis preta kaj adiaŭis miajn amikojn



Turkio

en Bazelo por stiri la ruĝan biciklon Aŭstralien. Dum la unuaj tri tagoj akompanis min mia koramikino. Post nur kvar kilometroj ni jam trapasis la unuan landlimon, tiun de Germanio. Ni sekvis la riveron Rejno, foje je la germana, foje je la svisa flanko. Je la dua vespero ni renkontis aliajn biciklistojn en kampadejo. "Kien vi iros?" ili demandis. "Li iros al Aŭstralio", tuj respondis mia kunulino, "sed mi nur akompanas lin dum tri tagoj". "Nu... jes, tio estas mia celo", mi konfesis al la mirigitaj biciklistoj. Mi mem ankoraŭ apenaŭ povis kredi, ke mi estas survoje al Aŭstralio, la patra domo ankoraŭ estis nur kelkdek kilometrojn for. Ankoraŭ tiu vojaĝo sentiĝis kiel semajnfina ekskurso.

Ja estis stranga sento en la komenco kiam mi diris al homoj ke mi biciklos al Aŭstralio. La lando estas neimagineble for, kaj mi tute ne sciis kio atendos min. Neniam antaŭe mi estis en Azio, krom antaŭ multaj jaroj por unu tago en Kuala Lumpur kiam mi atendis la aviadilon por Aŭstralio. Kaj jen, mi estis survoje por trabcikli Azion por atingi Aŭstralion iom pli ol unu jaron poste. Freneze!

Post ses tagoj, trapasinte Alpoj, mi forlasis Svislandon kaj eniris Italion. Jam ekde nun, ĉiu loko estos nekonata al mi. Plenĝoje mi enbiciklis tiun vastan, al mi nekonatan mondon por esplori ĝin. Je ĉiu vespero en mia tendo mi studis la mapojn por decidi pri mia vojo la tagojn poste. Rapide mi volis trapasi Eŭropon por

atingi Istanbulon. Ĝis Istanbul jam estas longa vojo, preskaŭ 3000 km, sed iel mi sentis, ke nur tie mi vere komencas mian vojaĝon.

Survoje al Istanbul la landoj estas malgrandaj, je ĉiu semajno mi trapasis du aŭ eĉ tri landlimojn. En ĉiu nova lando mi devis antaŭkalkuli kiom da mono mi bezonos kaj ne preni tro da iu monspeco el la bankaŭtomatoj. En Kroatio mi povis ĝui por la unua fojo la gastamikecon de la Pasporta Servo. En Serbio mi sekvis la belan riverbordon de Danubo. Kaj post trapaso de Bulgarion mi vizitis en Edirne, Turkio, por la unua fojo moskeon. Ĝis la fino de mia vojaĝo mi vizitis multajn moskeojn, sed tiuj de Edirne restis la plej impresaj por mi. Eble ĉar estis la unuaj, sed certe ankaŭ pro ilia grandeco kiu sentigis al mi mian malgrandecon en tiu mondo, aŭ pro la komforta varmuma tapiŝo, kiu sentiĝis al mi, ke malgraŭ mia malgrandeco mi tamen estas parto de tiu granda bela mondo.

En Istanbul mi paŭzis dum dek tagoj. Mia amikino tiam havis unu semajnon da ferioj, do ŝi venis viziti kaj adiaŭi min el Eŭropo. Per ŝipo mi trapasis Bosporon. Turkio estis la unua granda lando, kie mi pasigis pli ol unu monaton. Ofte en la varma vetero de la turkaj montaroj mi profitis de la frumatena kanto de muezinoj el proksimaj moskeoj por vekigi. Rapide mi matenmanĝis, pakis mian biciklon, kaj kiam la homoj elvenis la moskeon, mi jam ekbiciklis en la matena lumo ĵus antaŭ sunleviĝo.

Kiam post iu longa bicikla tago mi piede trapaŝis la bazon en Kastamonu kaj ĝuis ĝian etoson, mi rimarkis ke mi estas la nura okcidentano, kaj ke tute ne ekzistas la kutimaj internaciaj ĉenoj da restoracioj aŭ vendejoj. En simpla restoracio ti vespermanĝis kaj agrable mi fartis, ke jen mi estas en iu tute alia kulturo, en alia mondo. La ĉiutaga vivo de la homoj ĉi-tie ja estas alia ol mia kutima vivo. Mi ridetis kiam mi pensis, ke mi fakte transigis min mem per biciklo en tiun kulturon, en tiun alian mondon. Mi miris, kiel facile estis. Mi nur uzis la forton de mia propra korpo. Eĉ ne unu guton da nafto mi bezonis kaj neniun komplikan teknikon, nur

## Irano



# vojaĝo de la ruĝa biciklo

 Benno Frauchiger

## 25.000-kilometra aventuro de svisa esperantisto

simplan biciklon. Tagon post tago mi estis biciklinta, daŭre orienten, kaj jen, jam post du monatoj mi estis en lando kaj loko tute stranga al mi. Alia penso trairis mian kapon: Homoj foje estis demandintaj min, kion mi farus se iu ŝtelus mian biciklon. "Mi ne scias", mi ĉiam respondis, "neniu ŝtelos mian biciklon". Sed nun mi pensis, ke eĉ se iu ŝtelus ĉion de mi, neniu povas ŝteli de mi la vojon kiun mi jam trapasis. La riĉeco de tiu vojo, la memoro de la renkontiĝoj kaj de la pejzaĝoj estas neŝteblebla. Tute senzorge mi povas ĝui tiun riĉecon kaj feliĉon. Kaj ĉiutage mia vojo iĝos pli longa, pli riĉa. Ĉiu tago donos al mi pliajn neforgeseblajn spertojn, plian neperdeblan riĉecon. Mi sentis min feliĉa kaj libera.

Tra pluraj montpasejoj mi atingis la monton Ararat en oriento de Turkio. Kun alteco de pli ol 5000 metroj ĝi estas la plej alta monto kiun mi iam vidis. Mi provis grimpi ĝin kun irana grupo da montgrimpistoj. Sed pro aĉa diareo kiu tro malfortigis min dum la nokto en la unua bazkampo, mi devis forlasi la grupon jam je la dua tago kaj resubeniiri.

Mi antaŭĝojis mian alvenon al Irano. Multon kaj multajn kontraŭdiraĵojn mi aŭdis pri tiu lando. Laŭ la informmedioj, Irano estas malbona, danĝera lando. En multaj vojaĝraportoj tamen homoj priskribis Iranon kiel elstare gastaman landon. Kaj ĉar mi lernis la persan lingvon, en Irano mi povis pli facile paroli kun lokaj homoj. Jam en Turkio kaj poste ankaŭ en Pakistano kaj Hindujo, mi ne havis komunan lingvon kun la plej granda parto de la homoj, kiujn mi renkontis, kvankam mi flue parolas kvar naciajn lingvojn, sed nur eŭropajn lingvojn.

Survoje al Tehrano, mi povis sperti jam la iran gastamon je pluraj okazoj. Kaj en Tehrano, kie mi volis halti por kelkaj semajno pro perslingva kurso ĉe la Tehrana Universitato, mi denove estis tre bonkore gastigita de la Esperanto-komunumo. Tamen, pro la fakto, ke mi pasigis ĉiutage plurajn horojn en busoj, subteraj trajnoj aŭ aŭtoj en la Tehrana trafiko por atingi la kursejon aŭ por vesperaj aktivecoj, mi decidis forlasi Tehranon jam post du semajnoj. Anstataŭ pasigi tiom da tempo en mekanikaj transportrimedoj sen vere antaŭeniiri, mi preferis pasigi la tempon sur mia biciklo kaj antaŭeniiri. Sed post kvar tagoj da biciklado mi ankaŭ haltis en Eŝfahano

por du semajnoj. Tie mi studis la persan lingvon kun privata instruistino kaj povis bicikli por moviĝi. Eŝfahano estas agrabla urbo, kaj tie mi ankaŭ renkontis multajn aliajn biciklistojn kaj vojaĝantojn. En la korto de la hotelo kie mi loĝis, iam troviĝis 10 bicikloj de eŭropanoj kiuj biciklis de Eŭropo al Hindujo, al Ĉinio aŭ ĉirkaŭ la mondo. Videble mi ne estis la nura biciklo-frenezulo.

Iam ankaŭ venis la momento por forlasi Eŝfahanon kaj daŭrigi mian vojon orienten tra la dezertoj de Irano kaj Pakistano. Kvankam estis la sankta monato de Ramadano, dum kiu oni ne rajtas manĝi aŭ trinki dumtage, ofte aŭtomobilistoj, kamionistoj aŭ vilaĝanoj regalas min per trinkaĵo aŭ mangaĵo. El la rekonstruata urbo Bam, kiu estis tute detruita de tertremo en 2003 mi devis trabicikli la dezerton Lut. Mirigite mi rigardis ĝian pejzaĝon. Por dekoj da kilometroj, ĝis la horizonto en iu ajn direkto estas nur sablo kaj ŝtonoj. Eĉ ne unu eta seka verdaĵo. Kun mia biciklo en tiu dezerto mi sentis min kvazaŭ kun eta boato meze de oceano. Estis oceano da sablo. La malmultaj homoj kiuj preterpasis min per aŭto ridetis kaj salutis min. Malgraŭ la kontraŭvivaj kondiĉoj de tiuj dezertaj pejzaĝoj, ili tre plaĉis al mi, ĉar estis lokoj de silento, soleco kaj malpleneco. Estis nur mi, la senfina vojo kaj la biciklo. Ĉio estas morta ĉirkaŭ mi, sed mi vivas!

La lastajn 80 kilometrojn ĝis la landlimo al Pakistano, la irana polico ne volis lasi min bicikli. Estus tro danĝera pro teroristoj, ili diris, kaj proponis transporti min per aŭto al la landlimo. Ne, mi diris, mi volas bicikli. Tamen ili insistis kaj post preskaŭ unu horo da diskutado forlasinte Zahedanon, mi povis interkonsenti, ke ili transportos min nor 8 kilometrojn kaj finfine mi akceptis. Sed dum la lastaj 72 kilometroj policaŭto akompanis min. En la okcidenta Pakistano mi povis denove bicikli libere tra la dezerto de Baluĝistano. Sed tagon antaŭ la urbo Quetta, kiam

mi eniris la urbeton Nuŝki, policaŭto atendis min, kaj la policistoj ordonis al mi sekvi ilin al la policstacio. La hotelo ne estas sekura loko, ili diris. Kaj mi finfine pasigis la nokton en iu ĉambro de malliberejo plena je afganaj rifuĝintoj.

En Quetta atendis min bona surprizo. Post kiam mi sendis retpoŝton pri mia alveno en Quetta, amikoj kiujn mi renkontis en Irano venis al mia hotelo por bonvenigi min. Ili estis travojaĝintaj la dezertojn per buso kaj trajno.

El Quetta (je 1700-metra alteco) mi descendis en la valon de la rivero Induso. Ekde tie la polico insistis akompani min, sed almenaŭ ili ĉiam akceptis ke mi biciklu. Policistoj foje eĉ restadis ĉe la hoteloj kie mi tranoktis kaj matene denove mi estis akompanita. Tio multe ĝenis min, ĉar kiam polico akompanis min, mi ne povis renkonti la lokajn homojn same facile. Post naŭ tagoj da policaj eskortoj iumatene mi sukcesis fuĝi la policon kaj finfine povis denove bicikli libere. Komence de decembro 2006 mi atingis la urbon Lahoro, duonvoje al Aŭstralio.

Mia biciklo restis tie dum unu monato, dum kiu mi vojaĝis per trajno kaj buso al la valo Svat, al Peŝavaro kaj al Islamabado por organizi la vizon por Hindujo. En Lahoro mi vizitis du lernejojn por kiuj mi estis kolektinta monon per mia retpaĝo, kaj mi renkontis la lokajn esperantistojn. Fine de la jaro ankaŭ venis viziti min mia koramikino el Svislando.



Pakistano



(datiĝota en sekva numero)

**Antaŭ ekvojaĝo**



## TOMO BLAŽEKOVIĆ (1911 - 2007)

Kun granda bedaŭro ni eksciis pri forpaso de la plej aĝa kroata esperantisto, la 97-jara Tomo Blažeković el vilaĝo Bregi (apud Koprivnica). Li naskiĝis la 3-an de januaro 1911. Kiel kamparano, estinte 16-jara knabo li aliĝis al vilaĝana Esperanto-klubo en Bregi (fondita la 10-an de februaro 1924). Kurson de Esperanto li finis ĉe samvilaĝano Karlo Krapinec en 1927. Li apartenas al la plej malnova generacio de kroataj esperantistoj, kaj li verŝajne estis unu el la lastaj kiuj persone konis Mavro-n Spicer, la monumentan personon de nia landa movado, kiu estis honora membro de la bregia klubo ĝis sia morto. S-ano Blažeković estis tre aktiva klubano, kluba kasisto, kaj en 1934 eĉ LKK-ano (kasisto) de la 7-a landa (jugoslava) kongreso okazinta en Koprivnica. Dum la dua mondmilito la polico malbontraktis lin pro la poseditaj Esperantaj libroj, sed li ne ĉesis aktivi. Li troviĝas ankaŭ en la listo de kunfondintoj de la Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo, kiu fondiĝis la 21-an de septembro 1945 en la firmao "Prehrana" (lia nomo troviĝas en la listo de partoprenintoj sub la numero 15). Sur multaj fotoj de la vilaĝana Esperanto-klubo en Bregi li estas trovebla. Mi vizitis lin nur unufoje, en la jaro 2001, kaj laŭ lastaj informoj ricevita de lia familio, ni publikigis lian nomon en la listo de la plej aĝaj kroataj esperantistoj. Dum decembro atingis nin la informo, ke li forpasis ankoraŭ la 1-an de julio 2007. Li estis entombigita en la vilaĝa tombejo

en Bregi du tagojn poste. Sincerajn kondolencojn nia redakcio kaj tuta kroata esperantistaro direktas al liaj tri

filinoj: Milka Blažeković, Đurđica Belaj kaj Marica Maljak, kaj al aliaj familianoj.

*Josip Pleadin*



## DRAGAN BARAC (1937 - 2007)



Doktoro Dragan Barac naskiĝis la 21-an de aŭgusto 1937 en Topola (Oplenac). Klasikan gimnazion kaj Medicinan fakultaton li finis en Zagrebo. Specialiĝis pri fizika medicino kaj rehabilitiĝo kaj laboris en termalbanejo Čateške Toplice kiel specialisto. Pensiito ekde la jaro 1994, li vivis en Zagrebo. Kiel instruisto de stenodaktilografio kaj komerca korespondado li laboris en Kroata stenografia societo en Zagrebo ekde 1960 kaj estis ĝia prezidanto. Li esperantistiĝis en la jaro 1954 kaj ekde 1955 estis komitatano de Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo. Inter 1959 kaj 1961 li estis prezidanto de Studenta

En la unua aperjaro, nia redakcio disponigis certan kvanton da senpagaj abonoj al nepagipovaj esperantistoj. Ekde 2008 estas malfermita aparta

## ABONHELPA FONDUSO

al kiu ĉiu esperantisto, leganto aŭ abonanto, povas donaci certan sumon. El la kolektita sumo estos pagataj abonoj por nepagipovaj esperantistoj, ĉefe en landoj de Afriko kaj Azio. La pagojn bonvolu direkti al nia konto ĉe UEA: **plea-k** (kun mencio: "Abonhelpa fonduso"), aŭ enlande rekte al nia redakcio per poŝtmandato aŭ pagante al ĝirkonto de la eldonanto (vidu la paĝon 2).

Saldo	5,00 eŭroj		
2. Ljubica Sedmak (Pula)	6,80 eŭroj	25. Ana Then (Rijeka)	6,80 eŭroj
3. Velimir Majdak (Zaprešić)	6,80 eŭroj	26. Jelena Lončarević (Zagreb)	6,80 eŭroj
4. Mladenka Đaković (V. Gorica)	10,20 eŭroj	27. Josipa Katunar (Rijeka)	6,80 eŭroj
5. Danica Konečni (Karlovac)	6,80 eŭroj	28. Josip Vrančić (Hrvatski Leskovac)	10,20 eŭroj
6. Teodor Mikić (Dugo Selo)	13,61 eŭroj	29. Aleksije Herić (Vinkovci)	6,80 eŭroj
7. Anto Mlinar (Zagreb)	13,61 eŭroj	30. Kostadinka Šimunić (Zagreb)	6,80 eŭroj
8. Ljiljana Kuzmanović (Zagreb)	7,48 eŭroj	31. Bojana Đuričić (Zagreb)	6,80 eŭroj
9. Nedeljko Korasić (Zagreb)	3,40 eŭroj	32. Olga Štajdohar Paden (Zagreb)	6,80 eŭroj
10. Zlata Nanić (Zagreb)	10,20 eŭroj	33. Mirjana Žeželj (Zagreb)	7,48 eŭroj
11. Mila Bečka (Velika Gorica)	0,68 eŭroj	34. Teodora Kučinac (Zagreb)	6,80 eŭroj
12. Mea Bombardelli (Zagreb)	3,40 eŭroj	35. Josip Brkanac (Zagreb)	10,20 eŭroj
13. Emil Hrvatini (Matulji)	0,68 eŭroj	36. Karmen Crnković Vranko (Zagreb)	6,80 eŭroj
14. Milan Sudec (Zagreb)	6,80 eŭroj	37. Marica Brletić (Zagreb)	10,20 eŭroj
15. Jerko Baković (Zagreb)	6,80 eŭroj	38. Zdravko Jakovljević (Zadar)	6,80 eŭroj
16. Anonima (Zagreb)	17,01 eŭroj	39. Anonima	6,80 eŭroj
17. Fiore Saganić (Mali Lošinj)	13,61 eŭroj	40. Marija Vukušić (Zagreb)	6,80 eŭroj
18. Zlatko Hinšt (Zagreb)	3,40 eŭroj	41. Danijela Karković (Rijeka)	13,61 eŭroj
19. Melanija Grgić (Zagreb)	6,80 eŭroj	42. Boris Di Costanzo (Rijeka)	3,40 eŭroj
20. Martin Mihaldinec (Virje)	3,40 eŭroj	43. Jozo Marević (Velika Gorica)	6,80 eŭroj
21. Branko Repac (Zagreb)	6,80 eŭroj	44. Neven Kovačić (Zagreb)	10,20 eŭroj
22. Josip Šlat (Zagreb)	6,80 eŭroj	45. Damir Prpić (Zagreb)	30,61 eŭroj
23. Branka Čečuk Cesarec (Zagreb)	10,20 eŭroj	46. Birthe Lapenna (Danlando)	15,00 eŭroj
24. Bojana Đuričić (Zagreb)	6,80 eŭroj	<b>Ĝis nun kolektitaj:</b>	<b>361,18 eŭroj</b>

Dankon al ĉiuj ĝisnunaj donacintoj.

Esperanto-Klubo en Zagrebo kaj unu el la redaktantoj de "Bulteno de SEK". Li estis reprezentanto de KEJA en Jugoslavio Esperantista Junulara Asocio. En 1961 li fariĝis sekretario de Kroatia Esperanto-Ligo. Inter la unuaj li fariĝis ankaŭ abonanto de "Zagreba Esperantisto". Li forpasis subite la 19-an de novembro, nur unu tagon post kiam li renovigis sian abonon por 2008. Sian eternan kuŝejon li trovis en la zagreba tombejo Mirogoj, kie de li adiaŭis la multnombra ĉeestantaro la 21-an de novembro. Nia redakcio sincere kondolencas al liaj familianoj.

**FAJREROJ  
DE L'  
INSULO**

 **Dinko Matković**

Pavas katino  
kun siaj du katetoj  
feliĉas la kort'.

En trankvilo  
silkraŭpoj plektadas  
silkajn flugilojn

Florfolieto  
sur aranea fadeno  
balanciĝas

## DANCADO SUR PLACO DE LA POPOLO

 Lina Gabrielli

Nu, mi rakontis pri mia maskiĝo sur la azeno, pri la batoj ricevitaj de mia patrino kaj pri la famo, kiun mi akiris pro tiu bagatelajo. Ĉu tio sufiĉis al mi? Ne, ĉar mi refoje maskis min, sed jam sen skandalo pro la fakto, ke ĝi ne plu estis io eksterordinara. Ekzemple, la sekvantan jaron, kiam Pieroto jam ne estis en mia urbo, mi maskis min por partopreni komunan karnavalajan kun miaj ofiĉaj kamaradoj. En tiu tempo mi estis deĵoranta ĉe la Provinca Ligo kontraŭ Tuberkulozo, depende de doktoro Pulĉini. Miaj kamaradoj estis iom malicaj. Tamen okaze de Karnavalo ni ĉiuj akordiĝis, por havi kaleŝon, kiu transportis nin tra la stratoj de la urbo. Mi surmetis mantrikitan rozkoloran vestaĵon - longan kaj mallarĝan kiel intesto - kaj mi aktoris en la vesto de fianĉe forlasita knabino, kiu iris al la pastro kun alia junulo, por edziniĝe ripari la malbonfaritaĵon. Per la manoj mi premis pupeton en vindaĵoj kaj kriadis pro mia perdita honoro, sidanta alte apud la kaleŝa kondukisto; dume la pretekstita edzo, al kiu mi pruntis la melonĉapelon de mia patro - tiun, kiun mi estis uzinta por mia azenrajtado - sidis malantaŭe, meze de la ceteraj, kun humila mieno ŝajnigante sin mem la kulpulo. Por ĉiuj mi estis ludanta, sed mi kriis veranime pensante al malproksima Pieroto, tiel malproksima, ke li ne povis vidi min. Miaj krioj estis ploro, sed neniu supozis la veron; male, ĉiuj ridaĉis pro la bone imitita plorado kaj la akompanaj vortoj kiel "perdita honoro kaj malbonaĵo, kiun mi devas ripari".

Sed ne estas pri tio, ke mi volas paroli. Mi volas paroli pri alia travivaĵo, kiu amuzis min eble pli multe ol mia rajtado sur azeno.

Estis pasintaj kelkaj jaroj. Tiam je karnavala lundo mi ricevis inviton de la ĵurnalista klubo, kies membro mi estas, al "Maskobalo" en la komunuma teatro "Ventidio Basso". Mi ankoraŭ ne forgesis Pieroton; tamen aliaj interesoj plenigis mian vivon, por fari ĝin luma kaj plaĉa.

La ĵurnalistoj okupis la loĝion N-ro 7 de tiu teatro, kaj ĝi estis plenplena de koriandroj, paperĉapeletoj, floroj, ktp. Estis mia unua ĉeesto en "Maskobalo", tial mi tre scivolis pri ĝi. Jam baldaŭ la ĵurnalistoj iris al ter-eĝaĵo por danci, kaj mi restis sola, pro mia kruro.

Sed mi volis iamaniere amuziĝi. Pro tio mi rigardis ĉirkaŭen por vidi kion mi povus fari. Rimarkinte, ke multaj personoj staras ĉe la muro, sin apogante al ĝi, kaj ke mia loĝio estas en la unua vico, mi ekhavis ideon por atingi la celon sen iu ajna peno. Do, mi komencis grati la kapon de tiuj, kiuj estis sub mia loĝio. La elektito, kompreneble, sin turnis, por vidi tiun, kiu gratas lin, kaj mi, paf! tuj jetis al li la koriandrojn, plenigante liajn okulojn kaj buŝon, sen ke li havu la tempon, por vidi kaj riproĉi min.

Tiu ŝerco daŭris ĝis la kvina matene. Pli ol vi mi estas surprizita pro mia neenuiĝo per ludo monotona jam post tri-kvar provo. Versajne mia

animstato estis tiam tre ekscitita aŭ ĉiu malfeliĉulo reagis diversmaniere, tiel ke mi trovis en tiu ludo daŭran intereson. Ĉefpolicisto, kiu eniris la loĝion antaŭ mia foriro, kompatis min pro mia soleco. Sed rakontante al li mian rimedon, mi certigis lin, ke mi ne enuis. Fine mi forlasis la teatron, portante kun mi du tri ĉapeletojn por miaj genevoj, kiuj en tiu tempo estis knaboj.

Kiam mi trairis la Placon de la Popolo, iu arlekeno, kiu sidis sur ŝtupeto de la loĝiaro fronte al kafejo "Meletti", alparolis per ĉi: "Ĉu mi povas akompani cin?" "Akompanu!" La arlekeno flankiĝis al mi, ĝis la pordego de mia domo, apud la publikaj ĝardenoj. Li estis malriĉeta arlekeno, verŝajne knabo el la popolo, kun la pecetoj de la ŝtofo ne kolorita, kiu ne demetis la masketon kaj malmulte parolis, sed sciis doni al mi novan brilan koloron pri mia gajeco.

Apenaŭ enirinte mian ĉambregon, mi ŝlisis la pordon kaj tuj enliĝis. La revenintoj el la "Maskobalo" en la komunuma teatro rajtis ne iri al oficejo, pro tio mi intencis longe dormi.

Je la dua posttagmeze, komenciĝis la unuaj batoj sur la pordon de mia ĉambro, fare de miaj genevetoj. Ili min vokis: "Onklino, kiel longe vi dormas! Levigu, ni volas amuziĝi kun ci!". "Lasu min en paco!" mi respondis, kaj nur je la kvara mi malfermis la pordon, preta fari ilin feliĉaj per ludoj. Mi do surmetis flavan someran pantalonon, nigran bluzeton kun insigno de ŝerifo, apartenanta al Roberto, la fokajn pantoflojn admiratajn de Anna Maria, kaj sidigis kun la geknagoj sur la planko. Sed baldaŭ ni enuiĝis. Roberto kaj mi retroviĝis kun manteloj sur la apuda aleo "Alcide De Gasperi", kvankam li hontis pro sia nebela kostumo; kaj paŝo post paŝo, senkonscie, ni alvenis al la Placo de la Popolo.

La Placo de la Popoloj estis plenplena de homoj kaj mi per rapida rigardo tuj rimarkis, ke ili ne estas niaj samurbanoj, sed eksterurbanoj, precipe kamparanoj, kiuj tute ne konas min.

Tial mi diris al Roberto, ke li atendu min antaŭ la Turisma Agentejo kaj sen kapricoj, ĉar mi revenos baldaŭ. Mi tuj eniris la oficejon, demetis la mantelon, lasis ĝin tie kaj eliris. Nur kun la flava pantolono, nigra bluzeto kaj insigno de ŝerifo, sen masko sur la vizaĝo, mi miksiĝis inter la homamason. En la mano mi havis la bastonon; sed, pentrita, ĝi ŝajnis ludbastono por maskiĝo. Meze de la haoso mi instinkte eksaltis per unu sola piedo, kaj ĉar mi komencis salti, mi nepre devis saltadi; alie, se maliculo suspektus mian lamadon, li primokus min senhezite. Por mi la fakto, ke mi lamas, ne estas grava, sed mi scias ke ne ĉiuj same opinias; kaj je la pinto de la ĝojo kaj entuziasmo aŭdi voĉon kriantan: "Rigardu, kiel dancas la lamulino!" ne estis konsolo. Iuj ne konscias, kiel vundiga povas esti triviala vorto; kaj se ili konscias, ili kelkfoje plezurigas per tio. Ĉar mi ne volis permesi tion, mi saltadis, saltadis kun peno, krome kun timo de malsukceso, por kaŝi la fizikan defekton. De tempo al tempo mi apogis la malsanan piedon sur la pavimo, por reakiri iom da spiro. Pro la densa homamaso, neniu povis absolute suspekti mian mankon, kiu, paradokse, donis al mi tiun forton leonan.

Maskito tre alta, vera giganto, etendis al mi la manon por kunsalti. Ho kia streĉo por stari, por teni

la ritmon! Poste alia maskito, malpli granda, envolvita en domeno farita per litotuko, donis al mi eblecon salti facile. Multe mirigis la ĉeestantojn la fakto, ke mi havis tute puran vizaĝon kvankam ne kovritan per masko.

Post du-tri horoj, mi lasis la placon kaj direktis min al la Turisma Agentejo por mia mantelo. Nur tiam mi rememoris pri Roberto, ĉar mi vidis lin ankoraŭ min atendanta.

Kun la mantelo mi reprenis la lamadon. Tiuj, kiuj estis ĉe la rando de la placo kaj ĉeestis mian frenezan saltadon, nun rigardis min kun malfermegitaj okuloj. Kaj mi fieris pri mia sukceso.

Post du tagoj mi ne kapablis ellitiĝi pro la doloro en la saltinta kruro - la pantoflo ricevis truon tiel larĝan, ke la ŝuisto rifuzis ripari ĝin - sed la sekvantan tagon mi povis iri al pentrejo de Dino Ferrari. Li ne estis tie, pro tio mi eniris la apudan kinejon "Italia". En la koridoro, junulo malgranda, vizaĝe beleta, alproksimiĝis al mi kaj diris kun videbla intenco flankiĝi al mi: "Fraŭlino, hieraŭ vespere ni dancis kune sur la granda Placo de la Popolo". Mi bone rigardis lin. Jes, laŭ la talio, verŝajne li estis la maskito en litotuka domeno. Li ankaŭ ne povis dubi pri mia identeco, ĉar mia vizaĝo estis la sama, nome tiu, kiun li vidis sur la placo sen masko. Sed mi ne ŝatis lian proksimecon, pro tio senhonte mi respondis al li: "Ĉu ne estas stranga, kion vi asertas, sinjoro? Ĉu lamulino povas danci laŭ vi?" Tion mi diris kun tiel digna sinteno kaj kuntiritaj brovoj, ke la junulo forkuris senhezite ...


Ĉu li kredis al mi?!?

\*\*\*

Nun, ĉar pasis mutle da tempo, mi faras konfeson: mi ne atendis la venontan jaron, por foriri kun veturilo. Mi mendis ĝin jam en la sama jaro de mia maskiĝo kun azeno, nome la sekvantan mardon. Pieroto ne ŝatis mian maskiĝon kun azeno kaj mokis min: "Se vi estus almenaŭ surmetinta elegantan veston kaj luinta kaleŝon!" Do, mi volis montri al li, ke eĉ tion mi kapablos fari.

Kun brodita travidebla vestaĵo sur alia lazurkolora, vualo, kiu kaŝis mian vizaĝon, mi ne estis rekonebla. Ju pli mi paroladis pri mia maskiĝo kun la azeno, des pli mi silentis pri mia dua aventuro. Eĉ la kaleŝisto ne sciis mian identecon. Mi klopodis, ke la veturilo alproksimiĝu al la hejmpordo de Dada kaj eksaltis en ĝin kun la filino vestita kiel paĝo. La vulgo restis senspira, vidinta la kaleŝon kurantan kun nekonnata kaj eleganta damo. Mi pagis la luon de la veturilo por unu horo kaj ĉar Pieroto ne vidis min, mankis al mi mono por plie kuri ĝis renkontiĝo. Bedaŭrinde!

 **Snježana Habulin**



## LA ZAGREBA MUZIKPALACO

La Zagreba muzikpalaco ricevis sian nomon laŭ la komponisto Vatroslav Lisinski, la unua kroata muzikverkisto kiu ekverkis en la nacia spirito, montrante al postaj generacioj la direkton irendan en la kreado de origina kroata muziko. Kiel aŭtoro de la unua kroata opero "Amo kaj malico" (1846), Lisinski pruvis sian talenton ankaŭ en la kampoj de solo-kantado kaj korusliteraturo. Tragika persono de la iliria movado, kiu gvidis batalon por politika kaj kultura ŝanĝo de kroatoj, Lisinski mortis juna nesukcesinte kompletigi sian verkaron. Li naskiĝis la 8-an de julio 1819 en Zagrebo. Publikan muziklernejon li ne frekventis, sed kiel 14-jarulo li komencis lerni pianludon. Post la finitaj studoj de filozofio kaj juro en la tiama Reĝa sciencakademio, li komencis lerni ankaŭ harmoniumon. En 1842 li fariĝis publika oficisto kaj "jurinta notario". Lisinski lernis muzikon ĉe nobelo Juraj Karl Wisner Morgenstern. Je la iniciato de nobelo Albert Štriga, li komponis okazan vekmuzikon por solena akcepto de Ljudevit Gaj, kaj je sia 22-a naskiĝdato, la 8-an de julio 1841, per kanto "El Zagorje de pratempoj", kun teksto de Pavao Štos, Lisinski enpaŝis en la komponistan vivon kaj fariĝis elstara muzikverkisto de kroata nacia renesanco - Iliria movado. Kiam Štriga konkludis ke kroatoj devas havi sian nacian operon, la tute natura elekto de la komponisto estis elekto de Lisinski. La debuto de la opero okazinta la 28-an de marto 1846, dek jarojn post la unua slava nacia opero de Ivan Susanjin Mihail Glinka, kaj dudek ok jarojn antaŭ la opero "La vendita fianĉino" de Smetana, estas ŝlosila dato en la historio de kroata muziko. En aŭgusto



de 1848 Lisinski finis uverturon de sia opero "Porin", kaj en 1851 finis la kompletan operon. En sia repertuaro de 145 verkoj, Lisinski postlasis ankoraŭ kelkajn instrumentajn kaj piankomponaĵojn kaj antologiecajn horkantojn, el kiuj multaj apartenas al la plej belsonaj en la kroata muziko. Li mortis forgesita por edemo la 31-an de majo 1854.

Invititaj de la organiza komitato de la Unua Sesio de Asocio Internacia de Scienculoj (AIS) en Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino), kvarmembra delegacio de kroataj esperantistoj (Radenko Milošević, Zlatko Hinšt, Damir Pripić kaj Josip Pleadin) partoprenis la aranĝon en la najbara ŝtato la 7-an kaj 8-an de decembro 2007. AIS-Banja Luka, fondita apenaŭ en aprilo pasintjare, motnriĝis grava scienca organizaĵo en la ĉefurbo de Respubliko Serba. Temo de la Sesio estis "Signifo kaj rolo de la scienco en la nuntempa mondo".

Oficiala malfermo okazis en la reprezenta loko: *Banski dvor*, kun okaza kultura programo kaj ĉeesto de elstaraj personoj el la universitata kaj scienca rondoj de Respubliko Serba. Prezidanto de la Honora komitato estis akademiano d-ro Rajko Kuzmanović (prezidanto de Akademio de la sciencoj kaj artoj de Respubliko Serba), kiu mem ne povis partopreni la aranĝon pro la okazantaj elektoj por prezidanto de Respubliko Serba, en kiuj li venkis. La aranĝon solene en *Banski dvor* malfermis magistro Predrag Gluhaković, ministro de komerco kaj turismo en la Registaro de Respubliko Serba.

Ĉiuj prelegoj okazadis en ejoj de Filozofia fakultato. La prelegantoj povis elekti inter la serba, kroata, angla, germana kaj Esperanto. Estis prezentitaj



## SUKCESA LABORO DE AIS BANJA LUKA

 **Josip Pleadin**

28 sciencaj laboraĵoj, el kiuj 5 en Esperanto. Ĉiuj prelegoj estis presitaj en aparta libro, aperinta antaŭ la Sesio. Menciindas, ke prelegis multaj gravaj sciencistoj de Respubliko Serba. El Esperantujo fizike partoprenis Bojidar Leonov el Bulgario (en Esperanto), Zlatko Hinšt el Kroatio (en la kroata), Radenko Milošević el Kroatio (en la kroata), Ljubiša Preradović el Bosnio kaj Hercegovino (en Esperanto) kaj Mira Makivić el Bosnio kaj Hercegovino (en la serba), skribe Carlo Minnaja el San Marino (en la angla), Eva Polakova el Slovakio (en la germana), Humphrey Tonkin el Usono (en Esperanto), kaj virtuale (per video-konferenco) Sara Konerth el Rumanio (en Esperanto).

Kiel rezulto de la Sesio, inter AIS-Bulgario kaj AIS-Banja Luka estis subskribita Kontrakto pri kunlaboro, kaj estas iniciatita ankaŭ fondo de AIS-sekcio en Kroatio, pri kio estis informita Prezidantaro de Kroata Esperanto-Ligo.

Kiel aparta prelego estis prezentita vojaĝpriskribo de Tereza Kapista "Japanio el mia vidpunkto".

La kroata delegacio eluzis sian restadon en Banja Luka por

viziti ankaŭ Ekonomian Ĉambron de Respubliko Serba, kie akceptis ilin la prezidanto Nikola Tolimir kaj la plenumdirektorino Dragica Ristić.

En sia letero sendita al profesoro Ljubiša Preradović, la ĉefa organizanto de la Sesio, profesoro Bojidar Leonov el Bulgario skribis jene: "Paroprenante la Sesion, mi konstatis, ke Vi estas bona organizanto kaj mi ne dubas pri la sukceso de la sekvontjara SUS en Banja Luka, ĉar Vi kune kun Viaj gekolegoj, kunlaborantoj kaj la oficialuloj sukcese organizos ĝin. En Banja Luka estas bonegaj kondiĉoj por tranoktado de la paroprenintoj kaj ankaŭ salonoj por prelegoj." Senrezerve ankaŭ la kroataj partoprenintoj povas konfirmi la bonajn organizajn kapablojn de banjalukanoj. Ili invitis siajn gastojn ankaŭ al la Sesio okazonta en univiersitata kampuso aŭtune de 2008. La kroataj gastoj siavice invitis ilin partopreni la Simpozion en la Filozofia fakultato de Zagrebo, per kio ankorau plifortigus la ligojn inter la najbaraj landoj, sciencistoj kaj esperantistoj, maloftigitaj en la militaj kaj postmilitaj jaroj.

## MONDA TAGO DE BRAJLO EN KROATIO FESTITA ANKAŭ INTER NEVIDANTAJ ESPERANTISTOJ

 **Antun Kovač**

**Kroata unuiĝo de nevidantaj esperantistoj (KUNE) iniciatinto de brajlo en Kroatio**

Ĉu ekzistas pli bona ligilo por blinduloj de la mondo ol brajla skribo? Eble nur Esperanto alproksimiĝis al tiu ĉi idealo en periodo de granda kresko de Esperanto-movado inter la du mondmilitoj. Tiam ŝajnis, ke Esperanto, krom brajlo, estos la plej firma ligilo inter blinduloj. La eventoj en la dua duono de la 20-a jarcento, pli kaj pli malfavoris Esperanton. La brajla skribo en tiu

periodo estis parte ombrumita de aliaj teknikajoj per kiuj blinduloj havis pli rapidan kaj pli simplan aliron al informoj.

Sed, feliĉe, dume ekzistis ankaŭ blinduloj kiuj fidelis kaj al Esperanto kaj al brajlo. Precipe dank' al ili, la du universalaj ideoj kaj valorajoj ne nur pluvivas sed ŝajne ankaŭ kresketas, precipe brajlo. La aktivecoj de KUNE direktiĝas al flegado kaj evoluo de Esperanto-movado inter blinduloj en Kroatio.

KUNE kun Asocio por akceli klerigadon por blinduloj

kaj malfortvidantoj (AAKBMV) organizis ekde la 4-a de januaro 2005 tri tribunojn kadre de Monda tago de brajlo dediĉitajn al popularigado kaj aplikado de brajlo kaj de Esperanto. Dum la ĉi-jara Monda tago de brajlo KUNE prezentis brajlan Esperanto-kroatan kaj kroata-Esperantan vortaron "Dek mil vortoj" de aŭtorgrupo, preparita pasintjare kiel aparta projekto finance helpita de Ministerio pri familioj, defendantoj kaj intergeneracia solidareco.

**daŭrigo ➔ paĝo 24**







1) Ljubiša Preradović, la ĉefa organizanto de la Sesio de AIS Banja Luka, 2) El la muzika programo dum la solena malfermo, 3) Elstaraj personoj el la scienca medio de Respubliko Serba dum la malferma ceremonio en Banski dvor, 4) Nikola Tolimir kaj Dragica Ristić, la gvidaj personoj de Ekonomia Ĉambro akceptis la kroatan delegacio, 5) Vespermanĝo en la Hotelo "Vrbas" por eksterlandaj gastoj.



1) Antun Kovač kaj Sead Muhamedagić dum la prezento de la brajla eldono de vortaro "10.000 vortoj" la 4-an de januaro, okaze de la Monda tago de brajlo, 2) Stjepan Adanić salutis la kunvenon nome de la ministrino Jadranka Kosor, 3) Kvar volumoj de la nova brajla vortaro.



## ➔ daŭrigo el la paĝo 22

### La universaleco de brajlo

Antaŭ dudeko da jaroj la estimata blinda sciencisto d-ro Franjo Tonković pri brajla skribo diris: "Brajla skribo ne devas honti komparante sin kun iu el aliaj grandaj sciencaj inventaĵoj dum lastaj jarcentoj. Ĝia invento signifas por blinduloj tion, kio por vidantoj estas presprocedo de Johano Gutenbergo."

Kiel skribo por blinduloj, brajlo ekzistas 180 jarojn. Ĝia kreinto, la blinda franco Louis Braille, kreis ĝin en la jaro 1825 kiam li estis 16-jaraĝa. Kvankam la plej nova inter la konataj mondaj skribmanieroj (latina, cirila, ĉina kaj araba skriboj), brajlo tamen plej multe disvastiĝis, ĉar per ĝi skribas kaj legas blinduloj de ĉiuj lingvoj kaj landoj. Ĉiuj mondaj skriboj, krom brajlo, estas dediĉitaj por vidantoj kaj ilia elementa signo estas streketo. Elementa signo de brajlo estas punkto, kaj tiu skribo estas dediĉita al palposenso (tuŝosenso), ne al vidsenso kiel ĉiuj aliaj skriboj. Per palposenso oni povas samtempe rekonii maksimume sep punktetojn. Pro tio la nombro de punktetoj uzataj por signofarado en porblindula skribo estas limigita ĝuste al sep. En normigita brajlo, kiun nuntempe uzas ĉiuj blinduloj por signofarado oni uzas nur 6 punktetojn, per kiuj oni povas fari nur 64 signojn. Krom normigita brajlo ekzistas t.n. komputila brajlo, en kiu por signofarado oni uzas 8 punktetojn, per kiuj oni povas fari 256 signojn, kio egalas al nombro de signoj en la tabeloj uzataj ĉe personaj komputiloj por interkomunikado.

La universaleco de brajlo troviĝas antaŭ ol ĉio en la fakto, ke en ĉiuj lingvoj de la mondo oni uzas la samajn 64 signojn. Kie ajn eblis, oni klopodis uzi la saman brajlan signon por signi identan elementon.

Jen nur kelkaj opinioj pri valoro de brajlo, eldiritaj de partoprenintoj en la ĝis nun organizitaj tribunoj:

- brajlo estas universala skribo, la ĝemo kiun ni havas;

- por blinduloj gravas ke ili estu skribosciaj, kaj tion ili povas esti nur uzante brajlon;

- por blinduloj brajlo plu restas

neanstatuigebla sistemo de skribado kaj legado, kaj pro tio oni devas krei kondiĉojn por ĝia evoluo kaj perfektigo, pli bone dirite, por modernigo, kaj tion oni plej facile faros per ĝia uzado kaj aplikado ĉiunivele;

- per brajlo oni povas sukcese realigi la labortaskojn eĉ je la plej postulemaj kaj tre komplikaj laborlokoj;

- oni eĉ ne povas sukcese finlerni fremdajn lingvojn sen uzado de brajlo.

### Kio karakterizas la ĉi-jaran Mondan tagon de brajlo en Kroatio

Jen nur kelkaj personaj impresoj pri la manifestacio organizita de Kroatio unuigo de nevidantaj esperantistoj kadre de la Monda tago de brajlo:

1. Publika prezento de brajla Esperanto-kroata kaj kroata-Esperanta vortaro "Dek mil vortoj" estis la ĉefa evento organizita la 4-an de januaro. Inter aliaj partoprenis ĝin Josip Pleadin, unu el la aŭtoroj

de la Vortaro. La partoprenintoj aŭdis koncizan kaj tre instigeman prelegon de tradukisto, germanisto, Sead Muhamedagić pri praktika uzado de brajlo.

2. La Mondan tagon de brajlo plejparte festis ne nur blindaj kroataj esperantistoj sed ankaŭ membroj de kelkaj Esperantaj societoj organizataj en KEL. Grava gasto de la evento estis la ŝtata sekretario en Ministerio pri familioj, defendantoj kaj intergeneracia solidareco s-ro Stjepan Adanić, kiu salutis nin kaj parolis en la nomo de la ministrino Jadranka Kosor.

3. Ĉi tiu kunveno estis la unua (enkonduka) manifestacio en la solenaĵojn de KEL kadre de la centjariĝo de Esperanto en Kroatio.

4. La ĉeestintoj estis informitaj ankaŭ pri la 74-a IKBE (Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj), kiun gastigos KUNE de la 11-a ĝis la 18-a de julio en Premantura.

5. Radio, televido kaj ĵurnaloj dediĉis grandan atenton al nia programo, kiu dank' al tio, ne restis nur nia faka manifestacio (vidu paĝon 17).

6. La Mondan tagon de brajlo, kiun proklamis Monda unio de blinduloj en jaro 2000 en Melbourne, KUNE organizis jam kvaran fojon komence de la jaro 2005.

### Tom pri Louis Braille

Louis Braille naskiĝis la 4-an de januaro 1809 en la vilaĝo Coupvray (Francio), kaj mortis estinte nur 43-jara, la 6-an de januaro 1852. Kiom alte oni taksas lian inventon – la brajlon – interalie montras la fakto, ke li estas entombigita en Panteono, kie oni entombigas nur la plej glorajn homojn de Francio. La vidpovon Louis perdis jam kiel trijara infano ludante per aleno en laborejo de sia patro selisto. Sian skribon por blinduloj Braille eltrovis en la jaro 1825, do kiel dekseksjara lernanto en la Instituto "Valentin Haüy", en kiu li restis kiel instruisto ĝis sia morto.

De 1829, kiam Louis Braille unufoje oficiale prezentis sian skribsistemon, la brajlo, kvankam komence ne tuj akceptita, ĝis hodiaŭaj tagoj disvastiĝis tra la tuta mondo, adaptiĝante al ĉiuj novaj informadikaj teknologioj. Dank' al tio blindaj homoj nuntempe povas skribi, legi, komponi kaj kalkuli, uzi matematikajn kaj aliajn simbolojn kaj signojn: ĉion ĉi dank' al sistemo de ses punktetoj. Plej simple dirite, universala akcepto de brajlo hodiaŭ, ĝia enkonduko en porblindulajn lernejojn, fondiĝo de brajlaj presejoj kaj bibliotekoj, ktp., ĉio ĉi kreis kondiĉojn por sukcesa edukado, rekapabligo kaj postenigo de nevidantoj, por kontentigo de iliaj kulturaj kaj profesiaj bezonoj, samkiel por ilia memstara scienca laboro.

En la libro "Blinduloj en laboro" de Philippe Chazal oni povas tralegi:

"Mi kredas, ke brajlo, kio ajn nova estos inventita, neniam fariĝos antikvaĵo, sed tute kontraŭe, ĝi neniam haltos en siaj ĉiam pli novaj transformiĝoj, ĉefe pro tio, ĉar la kapablo legi kaj skribi nepre prezentas fundamentan agon en formiĝo de persono. Ĉiujn aferojn oni renkontas sur ĉi tiu vojo ekde 1825! Kaj por nenion kaŝi al vi, mi ne povas deteni min ekpensi: vidu, se Louis Braille ankoraŭ estintus inter ni, li estus unu el la plej grandaj herooj por trarabati novajn vojojn, pluen, ĉiam pluen ..."



# ESPERANTUJO TOGOLANDA ĈIAM AKTIVA

 *Gbeglo Koffi*

De la 24-a ĝis la 31-a de decembro 2007, Zamenhof pliafoje aŭdiĝis tra buŝoj. Unue estis festo en *Instituto Zamenhof*, kaj poste sekvis la 15-a TEK (Togolanda Esperanto-Kongreso). Fermiĝis la jaro per spontana kolektiĝo de esperantistoj en *Instituto Zamenhof* preskaŭ nur por babili. Precipas en tiuj ĉi aranĝoj la 15-a TEK, okazinta de la 28-a ĝis la 30-a de decembro 2007 en la urbo Aneho. Ĝin partoprenis 2 gefrancoj kaj pli ol 67 togolandaj esperantistoj, el kiuj almenaŭ duono estas IZO-anoj.

Nenio novas en la programeroj: inaŭguro, prelego pri la kongresa temo kaj diskutorondo, kurso por komencantoj, futbalmatĉo, kvizo, komitatkunsidoj, ekzamenoj, fermo, ktp. La kurson por komencantoj gvidis s-ro ATTAGLO Elom kaj ADJE Adjevi. Okazis ankaŭ la ekzameno sub la gvido de s-roj DOUMEGNON Koffi kaj DEGBE Zissou: du el sep kandidatoj sukcesis: RAMULANA Marouf kaj NOUWOATSI Kossi Sénam

El la diskutoj de komitatkunsidoj, oni notas, ke la togolanda movado pli kaj pli memstarigas. Plia afero koncernas aperon de esperantistoj "produktitaj" de Instituto Zamenhof aŭ/kaj de aliaj esperantistoj. S-roj EDAH Kossi Gadoufia (ekslernanto de IZO) kaj GBEGLO Dzifa (filo de GBEGLO Koffi) aperis ĉe la malferma

ceremonio kaj ankaŭ kungvidis la kvizon kun ADJE Adjevi kaj KOUEVIGAN Koffi. Certe pliaj tiaj "produktoj" aperos, kaj tio garantias la estontecon certan de la movado en Togolando.

La kongresa temo "Esperanto en la ĉiutaga vivo", gvidita de s-ro SEDZRO Moïse, kun la efika kontribuo de s-ro GBEGLO Koffi kaj SAGBADJELOU Kokou, naskis la rezolucion de la kongreso. Tiu ĉi rezolucio postulas de togolandaj esperantistoj honestecon, sindonemon, bonvolemon, efikan kunlaboron kun ĉiuj, regadon de la lingvo, kaj emfazas la per-Esperantan agadon. Palpebla ekzemplo estas verkado de afrikanoj kaj la rolo de Afrika Centro Esperantista en la eldonado de tiaj libroj: pli ol kvar verkoj eldonitaj de ACE aperis sur la ekspozicia tablo. Tiujn librojn aŭtoris GBEGLO Koffi, Princo Henrijo, Cophie PAPHES (kaŝnomo de GBEGLO Koffi), Michel NKWIRIKIYE kaj Gif de Rituel (kaŝnomo de GBEGLO Dzifa).

Se necesus paroli pri la mesaĝoj al la kongreso, menciindus dudeko da tiaj. Hans Bakker tute ne forgas siajn gefilojn togolandajn. Li kuraĝigis ilin daŭrigi la laborojn en tuta sendependeco, kalkulante je propraj fortoj. En la rondo de la Esperanta Civito venis vortoj (de la Konsulo kaj Vickonsulino pri triamondo), kiuj konfirmas la taŭgecon de la kongresa temo emfazanta la per-Esperantan agadon. Mesaĝo de la Beninano TĈHIKPE Privas estas senkulpiĝa pro laborpremo lastmomenta malebliganta la partoprenon de la prezidanto de Benina Esperanto-Asocio. Per aliaj mesaĝoj, geamikoj de la togolandaj esperantistoj salutas la kongresanojn.

Organizi kongreson fariĝas ĉiujaraĵo en Togolando, kies movado ofertas buntajn facetojn Esperantujajn. La 16-a TEK okazos de la 26-a ĝis la 28-a de decembro 2008. Pri la kongresa loko decidos la komitatkunsido de la 29-a de marto 2008.



## TURISTOJ POVAS AŬDI STRASBURGON EN ESPERANTO

Se vi troviĝos inter la turistoj kiuj ekskursas boate en la haveno de Strasburgo (Francio), nepre aŭskultu klarigojn en Esperanto, kiujn oni povas aŭdi elektante numeron 10 en koncertaj aparatoj sur tegmentaj boatoj. La tradukon kaj sonregistradon faris membroj de loka Esperanto-klubo.

## MALFERMA TAGO EN LA CENTRA OFICEJO DE UEA

La 27-a Malferma Tago en Roterdamo okazis sabaton, la 24-an de novembro, vizitita de 110 personoj el 18 landoj. Komence la libroservisto Ionel Oneț konatigis al la publiko la lastatempajn novaĵojn de la libra merkato. La ĉefa gasto d-ro Ulrich Lins prelegis pri "Esperanto kiel lingvo kaj ideo en orienta Azio" kaj "Mia alproksimiĝo al Zamenhof". Prelegis ankaŭ Ziko van Dijk (prezentinte sian libron "Informado praktike"), Jorge Camacho (prezentinte la propran poemaron "Eklipsas", Ragnarsson-volumon "La lingvo serena" kaj la unuan numeron de "Beletra Almanako"), Stano Marček (lanĉinte la nederlandan eldonon de sia lernolibro "Esperanto per rekta metodo"), Lusi Harmon kaj Diana Babeck-Weichert (kiuj prezentis la DVD-kurson "Esperanto - pasporto al la tuta mondo"). Krome, prezentiĝis ĝisnunaj kaj estontaj projektoj de E@I, interalie la planata reta informportalo pri Esperanto, kaj eŭropa Esperanto-partio Eŭropo-Demokratio-Esperanto (EDE). La programo finiĝis per unuhora renkontiĝo kun estraranoj de UEA kiuj respondis al diversaj demandoj. Libroservo vendis varojn por 2.858 eŭroj. La novaĵo de la 27-a Malferma Tago estis, ke Andrej Grigorjevskij filmis kaj enretigis kelkajn programerojn, kiuj spektblas ĉe: <http://www.liberrafolio.org/2007/malfermatago/>.

## UEA PARTOPRENIS LA ĜENERALAN KONFERENCON DE UNESKO

Havante oficialajn rilatojn kun Unesko ekde 1954, Universala Esperanto-Asocio ĉestis la 34-an Ĝeneralan Konferencon de tiu organizaĵo, okazintan en Parizo

de la 16-a de oktobro ĝis la 3-a de novembro 2007 kiel observanto. UEA estis reprezentita per vicprezidanto pri eksteraj rilatoj de UEA Raniei Clerici kaj la konstantaj reprezentantoj de UEA ĉe la Pariza sidejo de Unesko René Triolle kaj Barbara Despinye. Plifortigis la esperantistan teamon ankaŭ la observantoj de ILEI Jean-Pierre Boulet, Monique Arnaud kaj François Lo Jacomo. Lige kun la Ĝenerala Konferenco okazis ankaŭ Internacia Forumo de Civila Socio la 25-an de oktobro. Flanke de UEA partoprenis Triolle kaj Despinye kaj flanke de ILEI Boulet. La esperantistaj delegitoj efike utiligis la Konferencon kaj la Forumon por kontaktoj kun oficialuloj de Unesko kaj reprezentantoj de de aliaj neregistaraj organizaĵoj, ili disdonis multajn informilojn, precipe diverslingvajn versiojn de la Manifesto de Prago kaj la rezolucio de la 92-a UK en Jokohamo.

## UNESKO NULIGIS SIAJN OFICIALAJN RILATOJN KUN ILEI

ILEI perdis siajn oficialajn rilatojn kun Unesko, la organizaĵo de Unuiĝintaj Nacioj por edukado, scienco kaj kulturo. Ŝajnas, ke la nuligo de "operaciaj rilatoj", kiuj donis la rajton al ILEI memstare partopreni la aranĝojn de Unesko por neregistaraj organizaĵoj, kaŭzis la neglekto de ILEI sendi raporton al Unesko pri sia kontribuo al la



celoj de Unesko dum la pasintaj ses jaroj. En 2006 Unesko sendis al ĉiuj organizaĵoj kun oficialaj rilatoj formularon kun demandoj pri tio, kaj ĝia plenumkomitato en marto 2007 preparis sesjaran raportojn pri la kunlaboro kun neregistaraj organizaĵoj. ILEI ŝajne neniam respondis al la demando de Unesko. La sorto de la rilatoj inter ILEI kaj Unesko estis decidita

jam en marto 2007, ĉar en la sama raporto la plenumkomitato listigas la organizaĵojn, kiuj ne respondis. Krom ILEI, en la listo troviĝas 36 aliaj organizaĵoj. La prezidanto de ILEI, Radojica Petrović nenion komentis, sed tion faris François Lo Jacomo, kiu partoprenis la konferencon de Unesko kiel unu el la reprezentantoj de ILEI. Laŭ li, ILEI ĝis nun ne havis grandan utilon de la oficialaj rilatoj kun Unesko, kaj ajnakaze eblos ripari la okazintaĵon, se tio necesos.

## INVITO PRELEGI EN ROTERDAMO

Dum la 93-a UK en Roterdamo okazos la 61-a sesio de Internacia Kongresa Universitato. UEA invitas universitatajn profesorojn, docentojn kaj personojn kun simila kvalifiko sendi proponojn de prelegoj al la sekretario de IKU, prof. Amri Wandel, 767, IL-71799 Makabim, Israelo, rete: [amri@huji.ac.il](mailto:amri@huji.ac.il) ĝis la 31-a de januaro 2008.

## BULLER VETUROS AL MOSKVO

La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller, planas veturi al Moskvo dum printempo 2008 por surloke esplori kondiĉojn por eventuala Universala Kongreso en Rusio en la proksimaj jaroj. Tiu informo estis donita al Andrej Grigorjevskij, la prezidanto de REU (Rusia Esperanto-Unio) dum la novembra Malferma Tago en Roterdamo. En Moskvo Buller renkontos reprezentantojn de la urba registaro. Grigorjevskij lobiis en Roterdamo ankaŭ per disdonado de la jam pretigita kolora faldfolio "Bonvenon al Moskvo por Universala Kongreso - ĉu jam en 2010?" al estraranoj de UEA kaj la ĉeestintoj de la programoj dum la Malferma Tago. Sensukcese la inviton por organizi UK en Moskvo jam en 2009 rusiaj esperantistoj faris ankaŭ pli frue. Nun la afero kuraĝigas, ĉar ili ricevis nekutime favorajn promesojn pri financa subteno flanke de la urba registaro en Moskvo. Ŝajnas, ke gravas almenaŭ serioze esplori tiun eblecon, ĉar la urba registaro promesis subtenon por la jaroj 2009 kaj 2010. Se UEA eĉ ne esploros la eblecojn surloke, la demando pri kongreso en Moskvo povus fermiĝi por multaj postaj jaroj. Tion



konscias verŝajne ankaŭ la ĝenerala direktoro Buller, promesinte vojaĝi al Moskvo probable en aprilo.

#### NOBEL-PREMION AL UEA?

Du svisaj parlamentanoj, Gisèle Ory kaj Francine John-Calama, instigitaj de Svisa Esperanto-Societo, sendis sian proponon al la norvega Nobel-komitato kiu decidas pri la pacpremio, ke Universala Esperanto-Asocio ricevu pacpremion de Nobel. Klarigante sian proponon, ili skribis, ke "Esperanto ebligas kontaktojn demokratiajn, ĉar la dialogantoj estas egalrajtaj pro tio ke Esperanto ne havas politikajn aŭ historiajn ligojn kun iu ŝtato". En la kandidatigo la du parlamentanoj mencias ankaŭ la rezoluciojn de Unesko favore al Esperanto, kaj la centjariĝon de UEA en 2008.

#### HUNGARA PORTALO PUBLIKIGIS ESPERANTLINGVAN ARTIKOLON

Okaze de Zamenhofa Tago la plej granda novajportalo en Hungario publikigis Esperantlingvan artikolon. Laŭ iniciato de Hungaria Esperanto-Asocio (HEA), la redakcio de la portalo Index.hu akceptis proponon de kunagado dum la 15-a de decembro. Index.hu, kun duonmiliono da vizitoj ĉiutage estas la plej vizitata retpaĝo en Hungario. Du horojn post la publikigo de Esperanta artikolo sur la reĵurnalo Index.hu, ĝi jam troviĝis ĉefpaĝe.

#### RAT-MAN PAROLAS ESPERANTON

Rat-Man estas la plej sukcesa nuntempa bildstria karaktero kiu foriris de la manoj de itala artisto Leo Ortolani. Malgranda super-

antiheroo, Rat-Man, ekparolis Esperante en la unika numero enhavanta kvin klasikajn rakontojn kaj unu originalan historion pri la unua renkontiĝo de la ratulo kun la Lingvo Internacia. La libreto estas eldonita de IEJ kaj JEFO, la itala kaj franca junularaj Esperantaj organizaĵoj. Iniciatis la tradukon de la komikso ankoraŭ en 2001 Daniele Binaghi, sed la eldono realiĝis nur en 2007. Ĝi estas presita en Slovakio ĉe la eldonejo Espero. La Esperanta "Rat-Man" estis prezentita dum la fama foiro "Lucca Comics & Games" en Lucca (Italio) komence de novembro 2007, kun ĉeestantaj Ortolani kaj Rossetto, por kies subskriboj amaso da homoj ĉirkaŭis la lokan esperantistan ĝiĉeton.



#### LIRO 2007 ELEKTIS LA PLEJ BONAĴN

La juĝkomisiono de la tradicia literatura konkurso "Liro 2007" (Aleksej Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korjenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov, Petro Palivoda), organizita de "La Ondo de Esperanto", ricevis 24 konkursaĵojn de 20 aŭtoroj el 7 landoj. Laŭreatoj estas la jenaj: Paul Gubbins el Britio (originala prozo), Hasano Ntahonsigaye el Burundio (originala poezio), Sergej Tihonov el Ruslando (traduka poezio el la rusa lingvo), Anna Pentus kaj Mati Pentus el Ruslando (traduka prozo el la rusa lingvo), Russ Williams el Pollando (traduka prozo el la angla lingvo), dum laŭdajn menciojn ricevis: Mihail Korotkov el Ruslando (originala prozo), Paŭlo Moĵajev el Ukrainio (originala poezio), Mikaelo Bronŝtejn el

Ruslando (traduka poezio el la rusa lingvo), Mihail Povorin (traduka prozo el la rusa lingvo) kaj Jack Warren el Britio (traduka prozo el la angla lingvo).

#### "SPEGULO" APEROS EN POLLANDO

Sub la titolo "Spegulo" komence de marto aperos en Pollando kvaronjara revuo kun socikultura enhavo. Ĝi estas ĉefredaktata de Tomasz Chmielik. La revuo estas turnita al leganto aktiva, lingve matura, kritike sekvanta okazantaĵojn en la moderna kulturo. Abonkotizo: 18,00 eŭrojn. Abonojn akceptas: Wydawnictwo HEJME, PL-41-250 Czeladz, ul. Wańska 21m. Bankkonto: 36 1140 2004 0000 3202 3141 1644, BIC/SWIFT: BREXPLPWWMBK.

#### NOVA ESPERANTOKURSO EN BOSNIO

✍ Mićo Vrhovac

En Ĉelinac, urbeto apud Banja Luka (Bosnio kaj Hercegovino), unuafoje en la historio okazas kurso de Internacia Lingvo Esperanto. La kurson kunorganizis la Urba Esperanto-societo "La mondo" el Banja Luka kaj Mezlernejo el Ĉelinac.

Ĉelinac-anoj en aprilo 2007 havis eblecon ĉeesti la publikan prezonon de libro *Esperanto - lingvo de paco en Burundo-Afriko* verkita de la konata esparantistino Tereza Kapista el Beogrado. Post tio naskiĝis la ideo organizi Esperanto-kurson en la urba Mezlernejo. La iniciantintoj estis s-ro Mićo Vrhovac, prezidanto de la Urba Esperanto-societo "La mondo" el Banja Luka kaj profesorino de la Mezlernejo en Ĉelinac, Nada Dinkov.

La kurson vizitas 15 gelernantoj kaj du profesorinoj. La kursgvidanto Mićo Vrhovac, tre kontenta pri la grupo, intencas post la fino de la kurso, kun profesorino Dinkov fondi Esperanto-sekcion en Ĉelinac.

## 15 JAROJN SEN ...

*Vlado Jurković*

En la jaro 1953, inter la 25-a de julio kaj la 1-a de aŭgusto, okazis en Zagrebo la 38-a Universala Kongreso de Esperanto. Du monatojn antaŭe, precize la 25-an de majo vespere je la 23h00 estis elsendita unuafoje Esperantlingva informo al la tutmonda esperantistaro: "Parolas Radio Zagreb - Parolas Radio Zagreb. Karaj aŭskultantoj, vi povas aŭskulti niajn Esperantajn programojn ĉiujaŭde je la sama homo." Tiujn vortojn eldiris d-ro Ivo Borovečki, prezidanto de la Loka Kongresa Komitato.

Kelkaj membroj de la LKK gviditaj de la prezidanto Ivo Borovečki vizitis dum aprilo tiujare la estraron de Radio Zagreb kaj la ĝeneralan direktoron Ivo Sarajčić, petinte realigi Esperanto-elsendon dumkongrese. Ili demandis pri la ebleco, ke tiu programo restu ankaŭ post la fino de la Kongreso. Post kelkaj tagoj la LKK ricevis sciigon, ke la peto estas aprobita.

La Esperantaj elsendoj okazadis unufoje semajne en daŭro de 15 minutoj. Dum la Kongreso estis ĉiutage elsenditaj programoj pri la laboro de la UK. La Kongreso finiĝis kaj la Esperantaj elsendoj restis en la programo de la Radio.

En la komenco, antaŭ kaj dum la UK, la radio-elsendojn redaktis Dalibor Brozović kaj poste realigis ilin d-ro Ivo Borovečki (de 1953 ĝis sia foriro al Etiopio en 1956), Emilija Lapenna (1953 ĝis 1992), Berislav Brajan (parolisto, 1953 ĝis la fino de 1956), Marinka Svetličić (parolisto, de 1953 ĝis sia edziniĝo al Slovenio fine de 1957) kaj en la kongresa jaro (1953) ankaŭ Lucija Borčić kaj Franjo Vokoun. En aliaj periodoj la radio-elsendon realigis: Josip Šlat (parolisto kaj ĵurnalisto, 1956-1959), Marko Demetrović (redaktoro kaj tradukisto, 1956-1970), Vlado Jurković (1956-1992, komence teknika reĝisoro kaj poste ĵurnalisto kaj raportisto ekde la jaro 1958), Mirko Mamužić (parolisto, 1959-1964), Mía Zupanić (parolisto, 1961-1964), Damir Mikuličić (parolisto, ekde fino de 1961 ĝis 1984), Neven Kovačić (parolisto, junio 1986 - 1988), Vida Jerman (parolisto, 1979-1992), Saša Pilipović (parolisto, 1981-1989), Tomislav Radić (parolisto kaj redaktoro de politikaj informoj, 1973-1992) kaj Julije Perlaki (parolisto, 1990-1992).

La programo komence ofte konsistis el interesaj fragmentoj de diversaj Esperantaj verkaĵoj kaj kulturaj novaĵoj okazantaj tiutempe enlande. Kun

tempopaso la programoj pliboniĝis, kaj tra la jaroj intensiĝis.

En la jaro 1957 okazis en Rijeka IFEF-kongreso, kaj nova membro de la redakcio Josip Šlat venis al la ideo, ke ni faru reportojn pri la laboro de tiu kongreso, kiu okazis meze de majo. Estis faritaj du raportoj kaj kelkaj intervjuoj surbendigitaj.

En la sama jaro okazis fine de julio la 42-a Universala Kongreso en Marsejlo (Francio), kiun partoprenis Josip Šlat kaj Vlado Jurković. Ili faris la kongresajn raportojn kaj rekte forsendis la surbendigitajn materialojn pere de Radio stacio Marsejlo al la zagreba studio.

En tiu jaro fakte komenciĝis Esperanto-programo kun preparitaj raportoj pri ĉiuj gravaj Esperantaj okazintaĵoj en Eŭropo. La sekvontan jaron (1958) estis farita raporto pri la 43-a UK okazinta en Majnco (Germanio), kaj sekvis ĝin la varsovia UK en 1959, la brusela en 1960, Harogaten, Kopenhago ktp. Krom tio estis faritaj raportoj kaj intervjuo pri la aktiva laboro de niaj Esperantaj asocioj, preskaŭ el ĉiuj respublikoj de tiama Jugoslavio. Speciale mi devas mencii la urbojn Petrinja kaj Zlatar, kie

funkciis kursoj gvidataj en kelkaj elementaj lernejoj. Preskaŭ ĉiujare, fine de la kursoj, estis faritaj raportoj pri ili kaj interparolo kun la kursanoj.

En la jaro 1971 ankaŭ la redakcio pensis pri 5-minutaj turismaj kaj kulturaj novaĵoj el Jugoslavio. Menciindas, ke la redakcio tute libere elektadis ankaŭ politikajn okazintaĵojn sen ia ajn kontrolo aŭ cenzurado.

Kun la veno de la jaro 1990 komenciĝis politikaj ŝanĝoj en tiama federacia Jugoslavio.

Sendependiĝis la federaciaj respublikoj kaj en la jaro 1991 komenciĝis milita stato en Kroatio. Sed Radio Zagreb pene daŭrigis Esperantan programon. Anstataŭ jaŭde, en Esperanto ni elsendis dimanĉe je la 23h45.

Post proklamo de la sendependiĝo de Slovenio kaj Kroatio, Radio Zagreb transformiĝis al Kroata Radio, sed plue elsendis Esperantan programon. Komence de la jaro 1992 ŝanĝiĝis la estraro de Kroata Radio, kaj per alveno de nova ĝenerala direktoro Antun Vrdoljak, fine de junio aperis la decido, ke la Esperanta programo devas esti forigita el Kroata Radio. Bedaŭrinde, post 39 jaroj da kontinua elsendado unufoje semajne, post la 14-a de julio 1992 la Esperanta elsendo ne plu estis aŭdebla en Kroata Radio. Multaj kiuj traleĝos ĉi tiun artikolon starigos la demandon pri veraj kaŭzoj de la ĉeso. La elsendoj estis ĉesigitaj pro la aserto de la ĝenerala direktoro, ke "tiun ĉi lingvon uzas nur komunistoj por interkomunikado". Vi mem taksu la verecon de ĉi tiu aserto.





**La teamo de Esperanta elsendo de Radio Zagreb en 1963: Vlado Jurković, Emilija Lapenna, Mirko Mamužić kaj Damir Mikuličić (kun la jubilea ŝildo).**





## FONDITA UNUIĜO DE ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

  **Josip Pleadin**

La 12-a de decembro estis grava dato por zagrebaj esperantistoj. Tiun merkredon je la 14h00 kolektiĝis en Zagreba Ekonomia Ĉambro unuopaj zagrebaj esperantistoj por fondkunveno de Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE). Refondo de Zagreba Esperanto-Ligo estis planita jam en 2005, kaj anoncita en la unua numero de "Zagreba Esperantisto" pasintjare. Post multaj klopodoj kaj obstakloj, en decembro pasintjare definitive estis fondita la organizaĵo, kiu kreskos sur tradicioj de Zagreba Esperanto-Ligo.

La fondkunvenon partoprenis: Radenko Milošević (kiel kunvokinto kaj iniciatinto), Damir Prpić, Snježana Habulin, Nikola Turk, Marija Jerković, Anto Mlinar, Jožo Marević, Vlado Jurković, Stjepan Žarina, Spomenka Štimec, Neven Kovačić, Antun Kovač kaj Josip Pleadin.

La fondkunvenon gvidis Radenko Milošević, la protokolinto estis Snježana Habulin, kaj oni diskutis



pri la celoj de nova organizaĵo, pri la statuto kaj ĝia plua agado.

Estis menciite, ke la preparoj por bona funkciado jam komenciĝis. La kvar numeroj de "Zagreba Esperantisto" kiu estonte devus fariĝi oficiala organo de UZE, aperis regule kaj estis bone akceptitaj de la legantaro kaj kunlaborantoj. Funkcias blogo, kiu atingis jam pli ol 1000 vizitojn. Post la diskuto elektiĝis la Estraro de UZE: Radenko Milošević (prezidanto), Josip Pleadin (vicprezidanto) kaj Damir Prpić (sekretario)

La 17-an de decembro la fond-dokumentoj estis transdonitaj al koncerna urba institucio por oficiala registrado. La konfirmo pri registro estis ricevita post precize unu monato - la 17-an de januaro 2008.

Intertempe la blogon de "Zagreba Esperantisto" rearanĝis ĝia nova provizora redaktanto Mato Špekuljak (vidu: <http://zagreba-esperantisto.blogger.hr/>).

Laŭ unuaj konsultiĝoj de la Estraro estis taksitaj jena demandoj:

1) ALIĜKOTIZOJ: en la unua jaro (2008) la aliĝkotoz ne ekzistos. Aliĝi al UZE povos ĉiu esperantisto akceptante la Statuton kaj plenigante la aliĝilon (kiu elŝuteblas el la blogo de "Zagreba Esperantisto" kaj troviĝas en papera formo aldonita al ĉi-tiu numero de nia gazeto). En proksima estonteco devus esti preparitaj membrokartoj sendotaj al ĉiuj aliĝintoj.

2) "ZAGREBA ESPERANTISTO" dum 2008, kiel planite, estos eldonata de UZE. La jarkolekton 2008 ĉefredaktos Josip Pleadin, dum Radenko Milošević estos respondeca redaktoro kaj dediĉos sin al organizaj kaj financaj demandoj de UZE. La Estraro de UZE rekomendas, ke ĉiuj membroj de UZE abonu "Zagreban Esperantiston", kunlaboru verkante, reklamante, subtenante la Abonhelpan Fonduson kaj abonigante aliajn esperantistojn, por efektivigi la necesan kvanton da abonoj por regula kaj sensubvencia aperado.

Ĉiujn aktualaĵojn bonvolu sekvi en la jam menciita blogo de "Zagreba Esperantisto".

# LA LOKO KIE LA SILENTO ESTAS ELOKVENTA KAJ LA VORTOJ STUMBLAS

*Rade Sibila*

*La rakontetojn en la libro "La loko kie la silento estas elokventa kaj la vortoj stumblas" kolektis kaj adaptis dr. sc Rade Sibila, la instruisto pri la transcenda meditado Maharishi.*

Multaj rakontetoj en tiu kolekto, novaj kaj malnovaj, estas kolektitaj el diversaj tradicioj. Oni ne scias kiu rakontis ilin la unuan fojon, sed ili apartenas al la spirita heredaĵo de la homaro. Legante ilin, iasence ili ŝanĝas la leganton – vin.

La rakontetoj anoncu al vi sian internan profundon kaj radiadon, ion kio superas la vortojn kaj pensojn. Ili parolu al via koro, ne nur al via menso. Povas esti, ke la mesaĝo el iu rakonteto en vi vekos tion, kion vi plej malmulte atendus.

## La puta kaj la laga ranoj

- De kie vi venas? demadis la puta rano la novan alveninton.
- De la lago!
- Ĉu ĝi estas tiel granda kiel mia putu?
- Nu, la lago estas multe pli granda ol via putu. La putu estas nekomparebla kun la lago.
- Vi troigas! Eĉ vi estas granda mensogulo! Kiel io en la mondo povus esti pli granda ol mia putu?

## La kreskado

"Ĉu vi aŭdis kion la ranido rakontis?", demandis unu raŭpo la alian. "Ke ni iun tagon transformiĝos kaj ke ni havos flugilojn! Ĝi diris, ke ni eĉ flugos!"

"Mi aŭdis pri tio. Povus esti", respondis la dua.

Sed la unua triste diris: "Ne kredu! Ĉu vi scias kion tiu trompulo ankaŭ diris? Ke iun tagon ĝi estos rano! Kaj tio vere estas tro!"

## La sanktaj vortoj

En la tombo de iu faraono de malnova Egiptio oni trovis kruĉon plenan da semoj.

Iu la semojn metis en fekundan grundon kaj ili komencis ĝermi.

La sanktaj vortoj de saĝulo estas kiel la plenvivaj semoj. Ili, samkiel la semoj, povas ripozi mil jarojn ĝis la momento kiam ili trovos fekundan grundon kie ili povos ekĝermi.

*Tradukis: Mirjana Žeželj*



*Zlatko Virč*

Kroata banuso barono Josip Šokčević naskiĝis en Vinkovci, la 7-an de marto 1811 kaj mortis en Vieno, la 16-an de novembro 1896. Lia patro estis oficiro pereinta ankoraŭ dum lia infaneco. Lia patrino Elizabeta devenis el malnova militregiona familio Ĉolić, kiu donis kelkajn generalojn. En Vinkovci li finis elementan lernejon, komencis frekventi gimnazion, sed kiel 11-jarulo li daŭrigis lerni, dediĉinte sin al militista profesio.

Kiel altranga oficiro akirinta rangon de general-helpanto kaj submarŝalo, li akiris la plej altajn distingojn, li estis la reĝa sekreta konsilisto, aŭstria barono, ĝisviva ŝtata konsilisto, anstataŭanto de la fama banuso Josip Jelačić kaj mem kroata-slavonia banuso de 1861 ĝis 1867.

Kiel banuso, Šokčević insistis pri la nomo de triunua reĝlando. Li oponis per sia subteno la konstruadon de fervojo, kiu estis interessfero de kroata ekonomio. Pro lia postulo al Kroatio estis redonita teritorio de Vojvodino. Dum lia regado estis akceptita decido pri fondo de Jugoslavia Akademio de Sciencoj kaj Artoj, akceptita la Teatra leĝo, kiu gravis por financado de kroata teatro. Estis fondita Tablo de la Sepopo, organizita unua dalmatia-kroata-slavonia ekspozicio, havinta tre grandan rolon en la evoluo de kompleta kroata ekonomio. Ĝi estis la tempo de disflorado



# KROATA BANUSO - BARONO JOSIP ŠOKČEVIĆ

de la ekonomio - malfermo de bankistaj institucioj. Li intensigis evoluon de la rivera ŝipado, estis esplorita la ebleco konstrui zagreban riverhavenon. Li instigis disvolviĝon de silkproduktado. En tiu tempo okazis komencoj de la kooperativa ekonomio, la forstista profesio atingis grandan progreson kaj aplikon. Estis fondita Agrokultura-arbokultura lernejo en Križevci kun grava rolo en la evoluo de agrikulturo kaj arbokulturo. Estis akceptitaj proponoj por fondo de Universitato kaj Medicina fakultato. Kroata Parlamento en 1861 proklamis "la kroatan lingvon por tuta teritorio de Triunua

reĝlando kune kaj ekskluzive por oficiala lingvo en ĉiuj fakoj de la publika vivo".

Dum neniuj banuso, pli aŭ malpli frue, estis tiom da kvalitaj ŝanĝoj kiuj influis la evoluon de Kroatio. Pro tio la nuntempa kroatia historiografio taksas banuson Šokčević unu el la plej meritaj kroataj banusoj de la 19-a jarcento, tuj post Jelačić kaj samgravan kun Mažuranić.

Kiam Vieno akceptis aliancon kun hungaroj, kaj kun ili sukbskribis kontrakton, ĉio evoluis al kontraŭa direkto ol estis la konvinkigo de Šokčević. Kiel militisto, li finis sian rolon

dum la kronado de caro Francisko Jozefo por hungara reĝo kontraŭ la volo de kroatia parlamento, sed post tio li postulis ekŝigon el la banusa funkcio, kaj pli poste li estis pensiita.

Li mortis en Vieno, en pornobela loĝejo kaj entombigita kun plej altaj honoroj. Forgesita, li kuŝis en la Centra tombejo sen signita tombo, kiu estis planita por neniigo.

Kultur-sporta societo "Hrvatski sokol" (Kroata falko) el Vinkovci, organizis transporton de liaj restaĵoj al Vinkovci en 2002. Li estis entombigita en la kapelo de sankta Maria Magdalena en la tiea tombejo, en la kapelo konstruigita de lia patrino.

Je lia naskiĝtago "Hrvatski sokol" organizas metadon de florkrono sur lian tombon, kun partopreno de reprezentantoj de Departemento Vukovarsko-srijemska, de la urbo Vinkovci, de lernejoj, junularo kaj loĝantoj.

Okaze de  
100 jaroj de Universala Esperanto-Asocio  
100 jaroj de Kroata Esperanto-Ligo  
100 jaroj de Esperanto-Societo Rijeka  
50 jaroj de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo

## *Esperanta firmao "Orbis Pictus"* *el Triesto, Italio* *10 - jara*

elkore gratulas al la jubileantoj kaj  
**INVITAS**  
al  
**speciala - internacia - solena - festa**  
**kongresa karavano**  
**Zagrebo - Roterdamo - Zagrebo**  
**18-27.07.2008. aŭtobuse**

al 93-a Universala Kongreso en Roterdamo, Nederlando  
kaj al ties Internacia Infana Kongreseto

**Bonvenu al la plej solena kaj gaja kongresa karavano!**

**ORBIS PICTUS** de Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34 129 Trieste, Italio  
Poŝtelefono en Kroatio: +385 / 99 50 11 912 - telefono/faksilo: +39/040 767 875  
orbispictus@iol.it

- Kompletaj kaj flekseblaj oferto de vojaĝo, loĝado kaj ekskursoj
- Alternativaj loĝeblecoj, fiksjaj kaj fakultativaj ekskursoj
- Kvalitaj servoj kontraŭ bonaj prezoj!
- Eblas ankaŭ survoja eniro kaj nur unudirekta vojaĝo taŭga ankaŭ por partoprenantoj de antaŭkaj post-kongresaj aranĝoj ekz: OSIEK-konferenco en Slovenio, LIBE-kongreso en Kroatio, IJK - en Hungario, MIRO en Kroatio



La tri numeroj de "Zagreba Esperantisto" estas mirigaj, vere bonkvalitaj kaj enhaviĉaj. Ili enhavas ne nur kutimajn sciigojn, sed ankaŭ diversspecajn informojn, historiajn, turismajn ktp., kio kontribuas al plikompletigo de scioj pri diversaj kampoj de Esperanto-movado kaj de Kroatio mem.

**Boriša Milićević (Novi Sad, Serbio)**

Estimataj geamikoj, mi estas 40-jara viro el Hispanio, dumviva pensiulo, kiu vivas sola. Kvankam miaj enspezoj garantias al mi bonan vivon sen labori, mi havas kutiman problemon: mi estas sola en la vivo, mi neniam geedziĝis kaj mi ne havas gefilojn. Pro diversaj kialoj mi devis prizorgi miajn gepatrojn. Post kiam ili mortis, la vivo pasas kaj mi estas sola. Mi multe vojaĝis tra Esperantujo, sed mi ne trovis virinon, almenaŭ por komenca amikeco. Mi ŝatas vian landon kaj viajn virinojn. Mi certas, ke ekzistas multaj virinoj kiuj volas ŝanĝi la vivon, kaj kiuj ankaŭ serĉas viron por kunvivi. Por mi ne gravas se mi devas iri al via lando por koni interesan virinon al kiu mi pretas helpi en ŝia serĉado. Mi estas sana viro, mi vizitas dufoje en la tago sportejon, kaj mi estas amatora sportisto, nedrinkanto. Mi petegas al vi, ĉu eblas publikigi anoncon en via revuo aŭ per iu alia maniero diskonigi mian intencon trovi vivkunulinon en via lando. Se per via helpo mi trovos virinon kiu parolas Esperanton, mi faros ĉion kaj donos al ŝi multe da feliĉo.

**William Davids (Hispanio)**

[williamdavids@yahoo.es](mailto:williamdavids@yahoo.es)

Mi dankas pro la "Zagreba Esperantisto", bonega revuo, kiu post longa tempo igas min legi pri la vivo en Esperantio kaj eĉ tentas min partopreni.

**Zdenka Rojc (Maribor, Slovenio)**

Je la invito helpi per intersteno, aperigita en la "Zagreba Esperantisto" 1/2007, paĝo 16, eble mi povus iom helpi, se ne anonciĝis jam iu alia kun pli bona kaj konkreta propono. Kiel 7- kaj 8-klasa gimnaziano en Slavovski Brod, en la jaroj 1935 kaj 1936, mi ellernis Esperanton kaj Esperantan interstenojn. Tiam mi bone skribis kaj legis ĝin kaj iom ankaŭ korespondis kun nun jam longe forpasinta sinjoro Kirhofer en Brod. Sed tio estis antaŭ 70 jaroj en kiuj mi tute forgesis Interstenojn. Antaŭ nelonge mi trovis inter miaj libroj la etan lernolibron de interstena gvidlibro por Esperanto. Eble oni povus trovi volontulon kiu en unu monato el la libreto sukcesu ellerni interstenojn kaj helpu deĉifri la esperantaĵojn de Gregurek. Kompreneble, estus pli bone se iu esperantisto scianta Interstenojn anoncis sin por la helpo en tiu laboro. Kun estimo,

**D-ro Vinko Milinković (Rijeka)**

Karaj redakcianoj, vidu kiel belegan artikolon pri "Pasporta Servo" mi trovis en la revuo "Meridijani" n-ro 5/2007!

**Mirjana Žeželj (Zagrebo)**

Feliĉan Kristnaskon kaj novjarajn festotagojn. Sukcesan laboron en la jaro 2008 al la redakcio de "Zagreba Esperantisto" deziras

**Zlatko Hinšt (Zagrebo)**

Mi sendas al vi informon pri nova Esperanto-kurso en Bosnio kaj Hercegovino kaj esperas, ke ĝi aperos en via/nia Esperanto-gazeto. Dezirante al vi feliĉan kaj sukcesan novan jaron, kun estimo

**Miĉo Vrhovac (Banja Luka, Bosnio kaj Hercegovino)**

Prilredio Kristijan Brkić

## Pasporta Servo

Želite li putovati po svijetu i platiti malo ili ništa za prenoćište, susresti nove i zanimljive ljude koji će vas primiti u svojim domovima, posjetiti mjesta poznata samo mještanima, izbjeći jezične teškoće te posvetiti vrijeme upoznavanju kraja i ljudi - morat ćete se malo potruditi. Naravno, samo ako već ne znate esperanto. Esperanto zajednica objavljuje brošuru »Pasporta Servo« u kojoj možete naći adrese i kontakte ljudi u 85 zemalja koji će vas ugostiti, a od vas očekuju da znate esperanto. Stoga prvo posjetite najbliže esperanto društvo ili jezik sami kod kuće naučite uz pomoć tečajeva na prva dva linka. Kada naučite esperanto, posjetite treći link i provjerite gdje biste mogli putovati.



[www.cursodeesperanto.com.br/bazo/index.php?hr](http://www.cursodeesperanto.com.br/bazo/index.php?hr)

<http://jagor.srce.hr/esperanto-ke/eo/index.html>

[www.tejo.org/eo/ps\\_mapoj](http://www.tejo.org/eo/ps_mapoj)



Posjetite naše web stranice [www.meridijani.com](http://www.meridijani.com)



# MAGIVERDA INTERNACIA RENKONTIĜO (MIRO) en magiverda regiono de Duga Resa en Kroatio

 *Sanja Damjanić*

Tostu kun ni!

Kroatio havas multajn kaŭzojn por festi: 100-an jubileon de Esperanto en Kroatio kiun ni solenis en urbo Rijeka, 50-an jubileon de Studenta Esperanto-Klubo en Zagrebo, centjarigon de la Movado landnivele, 15-an jaron de Kroata Esperanto Junulara Asocio (KEJA), sed ne malgrave, la jubileon 10-an Magiverdan Internacian Renkontigon (MIRO)!

MIRO estas internacia Esperanta renkontigo organizata de KEJA. Ĉiu MIRO estas dediĉita al aparta temo kaj la litero M en ĝia nomo estas mallongigo por, ekzemple: marborda, mezepoka, moda, miskomprena, ktp. MIRO proponas al ni eblecon por renkonti esperantistojn el aliaj landoj kaj por interŝanĝo de diversaj kulturoj, sed ankaŭ interkonatigon de kroataj esperantistoj el ĉiuj partoj de la lando. Alia motivo estas oferti amuzan, interesan kaj instruan renkontigon.

La vidindaĵojn de Kroatio multaj homoj ligas nur al Adriatika maro pensante, ke la plej granda prospero de la lando kaŝiĝas en ĝi. Kvankam la adriatika marbordo estas belega, la landinterno estas ankaŭ admirinda kaj ofertas spirhaltigajn pejzaĝojn. Konkvingiĝu pri tio elektante por via vizito ĝuste la regiono de Duga Resa, kiu estis elektita por okazigo de MIRO. La trankviliga magiverda koloro de rivero-belulino Mrežnica donis al ni la ideon nomi la renkontigon MAGIVERDA.

Imagu: Sidi apud la rivero! Ĉirkaŭe nur verdaĵo de arboj kaj herboj. Revo en ombro de saliko. Nufaroj ĝoje flavas kaj salutas vin el la akvo. Malbrua muĝo de akvofaloj.

Venante ĉi tien ekde mia naskiĝo, mi enamiĝis al mirinda amuziĝo kiu ĉiufoje denove logas kaj pelas min transdoni la impresojn al aliaj.

Balzamo por la okuloj, rivero Mrežnica, konata kiel unu el la kvar riveroj de Karlovac (urbo apud Duga Resa), kun longo de eĉ 64 kilometroj. Kvankam ĝia fluejo estas malpli longa ol tiuj de la aliaj tri riveroj, Dobra, Korana kaj Kupa, ĝi estas meciinda. Diversigas ĝin 93 kalktofaj akvofaloj kiuj, en siaj neegalaj distancoj kreis etajn lagojn, kaj oni demandas sin: Ĉu ĝi entute fluas? Pitoreskeco kaj diversaj formoj de kaskadoj fariĝis ĝia unikaĵo. Pro sia kristala pureco, kalktofaj barieroj, riĉo de fiŝspecioj kaj maloftaj specoj de animaloj kaj vegetaĵoj, ĝi estas proponita fariĝi naturparko. Ĝi estas paradizo por fiŝkaptistoj, banantoj kaj remistoj. Laŭlonge de la rivero akompenas nin mallarĝaj kaj larĝaj kanjonoj. Multas lignaj muelejoj, verdire, ne muelante kiel iam, sed ili estas protektitaj kulturaj monumentoj kaj vizitindaj partoj de la riverbordo.

Ĉiukaze, oni ne povas resti flegmaj! Iam en malgranda loko apud Mrežnica estis gastejo kiun gvidis gastejstrino Reza. Ŝi estis konata

laŭ sia alta statur, sed ĉiuj nomis ŝin "Duga" (longa). Venante en ŝian gastejon, la gastoj parolis, ke ili iras al "Duga Reza". La litero Z ŝanĝiĝis al S, kaj tiel ekestis la nomo de Duga Resa, agrabla urbeto, nia kaj via celo - la okazejo de MIRO.

Ĝi situas ĉe la piedo de monteto Vinica (321 metroj super marnivelo) apud la urbo Karlovac, en distanco de 60 kilometroj de Zagrebo, la ĉefurbo de Kroatio, al kiu ĝi estas bone trafike ligita per fervojo kaj aŭtoŝoseo.

Duga Resa evoluis dank' al fabriko "Pamučna industrija" (kotonindustrio). En 1884 Josip Jeruzalem aĉetis muelejon, kiu estis bazo por fondi fabrikon, ĉar la regiono havis tradician kultivadon de kanabo kaj lino.

Ĉu vi ŝatas promeni?

Pasu tra la ĉefa strato Kasar. Ĝi estas la ĉefa vendostrato kie estas malfacile rezigni pri freŝaj fruktoj kaj legomoj plukitaj en proksimaj ĝardenoj, kaj la konstruaĵojn ornamas surskriboj el la 15-a jarcento. Promenejo Tušmer etendiĝas laŭlonge de Mrežnica kie ĝia parto pasas tra la centjara parko kun historiaj domoj kaj monumentoj.

Ĉu vi ŝatas montgrimpri?

Se vi faras kelkajn pliajn paŝojn tra fungo- kaj vegetaj-riĉa arbaro, vi supreniros la monteton Vinica. Regalu vin per diversspecaj arbaraj fruktoj - beroj, rubusoj, riboj, kaj sur la pinto surprizos vin belega panoramo de la urbon kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

Se vi volas bicikli, Duga Resa disponas pri multaj biciklaj vojoj, laŭ kiuj vi povas veni al vilaĝo Belavići kaj pasi trans la plej longa ligna ponto en ĉi tiu parto de Eŭropo.

En la pasinteco, eĉ malnovaj romianoj estis admiritaj per belajfo de ĉi tiu urbeto. En la paroka preĝejo de Sankta Petro, menciita ankoraŭ en la 14-a jarcento, estas ekspoziciitaj restaĵoj el la romia epoko. Kapelo de Sankta Antonio en la urbocentro kaj aliaj kapeloj aldone pitoreskigas la regionon.

Restadi en Duga Resa kaj ne viziti apudajn urbojn estus vera domaĝo. Pro tio ni organizos ekskursojn al historiaj urboj Karlovac kaj Ozalj, sed ankaŭ ekzamenos vian remforton en la rivero Mrežnica, en la vilaĝo Generalski Stol.

Malproksimiĝante de nia restadejo, ni ne malproksimiĝas de riveroj, ĉar ĉi tie, krom Mrežnica, fluas ankaŭ Kupa, Korana kaj Dobra. Laŭ la proverbo "ĉiuj vojoj gvidas al Romo", same ni povus diri: "ĉiuj vojoj gvidas al Karlovac". La urbo troviĝas en loko kie plej gravaj ŝoseoj kuniĝas.

Fondita en la 16-a jarcento kiel kompakta urba kerno konstruita en formo de sespinta stelo, ĝi havis la taskon protekti la regionon kontraŭ turkoj. Krom ĝi, nur du aliaj urboj en Eŭropo havas ĉi tian formon - Palmanova en Italio kaj Nové Zámky en Slovakio. Karlovac estis konstruita sube de la fortikaĵo

Dubovac, sed sian nomon ĝi ŝuldas al princo Karolo Habsburga.

Dubovac estas la ĉefa turisma vidindaĵo kaj unu el ĝiaj kasteloj servas kiel belvidejo de kie etendiĝas rigardo al Karlovac kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

En la ĉefa urba placo - Placo de banuso Josip Jelačić - troviĝas franciskana monaĥinejo kaj preĝejo de Sankta Triunuo el la 17-a jarcento, kaj puto el 1869, ornamita per alegoria prezento de riveroj.

Etnologia kaj naturscienca kolektajtoj troviĝas en la urba muzeo, kaj la plej grava kultura instanco estas la teatro "Zorin dom".

Karlovac estas konata ankaŭ kiel urbo de verdajtoj pro multaj parkoj. Promenejo tra aleoj de hipokaŝtanujoj ĉirkaŭas la urbokernon ene de la urbaj remparoj. Vrbaniĉ ĝardeno - botanika ĝardeno apud Korana konsistas el maloftaj specioj de arboj kaj vegetaĵoj.

La riveroj invitas al banado, fiŝkaptado kaj Dobra estas konata pro siaj rapidfluojoj kaj aventura "rafting"-sporto.

Super Kupa, nemalproksime de Karlovac, situas malnova burgo Ozalj kun romiaj kaj mezepokaj



arkeologiaj trovaĵoj. Ĝiaj iamaj posedantoj estis la konataj feŭdaj familiaj Zrinski kaj Frankopan. Menciindas ankaŭ la baroka paroka preĝejo de Sankta Vido kaj ŝtona palaco "Munjara", iama hidroelektrejo.

Ĉu vi volas percepti Mrežnica je maniero el la enkonduka parto de ĉi tiu artikolo?

Esploru la netuŝitan naturon kaj prenu remilojn en la manojn, sidigu en boaton kaj lasu vin veturi laŭ la verda akvovojo sen bruo, sekvata nur de birdokanto aŭ mallaŭta muĝo de akvofaloj!

La generalo Vuk Krsto Frankopan havis sidejon en unu el multaj komunumoj de Karlovaca departemento. Tiel la vilaĝo Generalski Stol ricevis sian nomon kaj eĉ nuntempe oni povas sidigi sur pratempan ŝtonan tabulon.

Krom Mrežnica, granda potencialo estas sanigaj termalakvaj fontoj en Leŝće apud Dobra, konataj ankoraŭ el periodo de Napoleono. Vizitinda preĝejo de Sankta Georgo en vilaĝo Mateŝko estas la sola protektata sakrala monumento el la 13-a jarcento.

La loka loĝantaro estas gastama, kaj la kulturarta societo "Izvor" disvastigas kulturon de sia loko tra Kroatio kaj Eŭropo prezentante

malnovajn naciajn kutimojn, muzikon kaj dancojn.

Varmaj someraj tagoj inter la 2-a kaj 8-a de aŭgusto estas rezervitaj por riĉa programo: koncertoj, prelegoj, diskutoj, sportaj konkursoj, muzikaj laborgrupoj, nacia vespero (la 5-an de aŭgusto je nacia festotago en Kroatio) ktp!

La MIRO-ejo estos Studenta domo de mezlernejo "Duga Resa", kiu situas apud la riverbordo kaj riverplaĝo.

Kaj fine jen la demando: ĉu mi sukcesis interesiĝi vin? Jes? Riĉigu tiun ĉi renkontigon per via alveno!

Verda koloro estas nia koloro, koloro de Esperanto. Do, venu al sinjorino Duga Resa. Ŝi kun plezuro atendas vin por disvastigi amikecron en ĉiun mondoparton!

## Informiĝu kaj aliĝu ĉe: [www.keja.hr](http://www.keja.hr)

Poŝtadreso:

Kroata Esperanto Junulara Asocio  
Kneza Miŝlava 11  
HR-10000 Zagreb  
Kroatio

